

PREĜOSEMAJNO
POR LA UNUECO DE LA KRISTANOJ

Ĉu Kristo estas dividita?
(1 Kor 1,1-17)



18.-25.01.2014.

La libreto estas por libera disdono.

**LA 20-a EKUMENA E-KONGRESO
67-a IKUE-Kongreso 64-a KELI-Kongreso**

**TRENTO - Cadine, ITALIO
de la 16-a ĝis la 23-a de Aŭgusto 2014**

Temo: Ĉu Kristo estas dividita? (1 kor 1,13)

<http://www.ikue.org/cz/EEK%20Trento/EEK%20Trento.htm>

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista
Via di Porta Fabbrica 15
IT-00165 ROMA RM, Italio
telefono + fakso:
+39-06.39.63.81.29
ikue@ikue.org, www.ikue.org
www.esperokatolika.org
www.facebook.com/pages/Internacia-Katolika-Unuiĝo-Esperantista/263471327120529
groups.yahoo.com/group/ikue/
www.radio-vatikana-esperanto.org

* Ekumenismo en Kanado	55
* Kelkaj gravaj datoj el la historio de la Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj	63
* Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj : Temoj 1968-2014	65
* Enhavo	69

PREĜOSEMAJNO

POR LA UNUECO DE LA KRISTANOJ

Ĉu Kristo estas dividita? (1 Kor 1,1-17)

18.-25.01.2014.

*

*

Romo/Zagrebo, januaro 2014

Tradukis IKUE-anoj kaj aliaj bonvolaj Esperantistoj:

- Antonio *De Salvo*, Guidonia, Italio
- Daniel *Chevalier*, Ecquevilly, Francio
- Doris *Legat*, Dornbirn, Aŭstrio
- Mons. Gabriel *Anda*, Edea, Kamerunio
- Giovanni *Daminelli*, Sesto S. Giovanni, Italio
- Karl *Reinisch*, Graz, Aŭstrio
- Laura *Gentili*, Arezzo, Italio
- Luz *Vazquez*, Reus, Hispanio
- Marija *Belošević*, Zagreb, Kroatio
- Marina *Stepacheva*, Tjumeno, Rusio
- Mike *Leon*, Lower Hutt, Novzelando
- Paola Birgit *Giommoni*, Arezzo, Italio
- Pavol *Petrik*, Pečovská Ves, Slovakio
- Vitor Luiz *Rigoti Dos Anjos*, Serra (Espírito Santo), Brazilo

Reviziis: Antonio *De Salvo*

Kompilis kaj grafike aranĝis: Marija *Belošević*

La E-lingvaj tekstoj estas faritaj laŭ la tekstoj aprobitaj de la Papa konsilio por antaŭenigo de unueco de kristanoj kaj de la Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ de la Tutmonda konsilio de eklezioj (WCC)

IKUE, www.ikue.org
Zagrebo/Romo, januaro 2014

ENHAVO

* Baz teksto <i>Ĉu Kristo estas dividita? (1 Kor 1,1-17)</i>	7
* Teologia paŝtista enkonduko	8
* Ekumena diservo	15
* La unua tago: Kune... ni estas la popolo de Dio	27
* La dua tago: Kune... ni danku pro la graco de Dio en ĉiu el ni	30
* La tria tago: Kune... al ni mankas neniu el la spiritaj donacoj	34
* La kvara tago: Kune... ni proklamu, ke Dio plenumas siajn promesojn	38
* La kvina tago: Kune... ni estas vokataj al komuneco	41
* La sesa tago: Kune... ni klopodu esti kunigitaj	44
* La sepa tago: Kune... ni apartenas al Kristo	48
* La oka tago: Kune... ni proklamu la evangelion	52

- * (Prepara materialo el eklezioj en Argentino, kunsido ĉe Los Rubios, Hispanio)
- * 2004: Mian pacon mi donas al vi (Johano 14,23-31)
(Prepara materialo el Aleppo, Sirio - kunsido en Palermo, Italio)
- * 2005: Kristo, unika fundamento de la Eklezio
(1 Korintanoj 3,1-23)
(Prepara materialo de Slovakio - kunsido en Piestañy, Slovakio)
- * 2006: Ĉar kie du aŭ tri kunvenas en mia nomo, tie mi estas meze de ili (Mateo 18,18-20)
(Prepara materialo el Irlando - kunsido en Prosperous, Co. Kildare, Irlando)
- * 2007: Li igas la surdulojn aŭdi, kaj la mutulojn paroli
(Marko 7,31-37)
(Prepara materialo el Sud-Afriko – kunsido en Faverges, Francio)
- * 2008: Preĝu senĉese (1 Tesalonikanoj 5, 12a.13b-18)
(Prepara materialo el Usono – kunsido en Graymoor, Garrison, Usono)
- * 2009: Ke ili fariĝu unu en Via mano (Ezekiel 37,15-28)
(Prepara materialo el Koreio – kunsido en Marsejlo, Francio)
- * 2010: Vi estas atestantoj pri tio (Luko 24,48)
(Prepara materialo de Skotlando – kunsido en Glasgovo, Skotlando)
- * 2011: Ili persistis en la instruo de la apostoloj kaj en la kunuleco, en la dispecigo de pano kaj en preĝoj (Agoj 2,42)
(Prepara materialo el Jerusalemo – kunsido en Saydnaya, Sirio)
- * 2012: Ni ĉiuj estos ŝanĝitaj de la venko de Jesuo Kristo nia Savanto (1 Korintanoj 15, 51-58)
(Prepara materialo el Pollando – kunsido en Varsovio, Pollando)
- * 2013: Kion la Sinjoro postulas de ni (Miĥa 6, 6-8)
Prepara materialo el Hindio – kunsido en Bengaluro, Hindio)
- * 2014: Ĉu Kristo estas dividita? (1 Korintanoj 1,1-17)
(Prepara materialo el Kanado – kunsido en Montrealo, Kanado)

Estimataj,

En la manoj la trian jaron sinsekve vi tenas libreton, kiu estas komuna tradukado de dekkvaropo de bonvolaj personoj kiuj per disponigo de sia libera tempo ankaŭ montras propran elekton: esti guteto en la maro da deziroj „Ke ĉiuj estu unu“.

Denove ĉi jare, ne pretendante grandecon, tamen oni povas konstati ke la teamo iel montras la universalecon, tutglobecon en la pozitiva senco! Kvar kontinentoj!

Certe pluraj inter vi ĉeestos lokajn preĝokunvenojn kaj eble en la manoj tenos tiujn tekstojn en propra lingvo. Pro tio certe iuj starigos demandon kial la traduko al Esperanto estis farita?

Mi deziras memori al vi, ke jam de kelkaj jaroj ĉe la ttt-ejo de IKUE aperas tradukoj de la ĉefaj tekstoj. Interalie, sur tiuj tekstoj baziĝis ankaŭ la Ekumenaj diservoj dum la UK en Bjalistoko, Hanojo kaj Rejkjaviko.

Ĉi tiu kompilaĵo do havas pluran utileblecon. Jen kelkaj ideoj:

- dum la Preĝosemajno, en via loko vi povos kolekti Esperantistojn je Elingva preĝo kaj meditado super la tekstoj (ne forgesu „kie estas du aŭ tri kolektitaj...“)

- preĝorondoj jam utiligas diversajn interretajn kontaktojn, do oni povos similan fari ankaŭ dum la Preĝosemajno

- oni povos ankaŭ sola preni tekston de la koncerna tago kaj mediti super la elektitaj bibliaj tekstoj

- certe la kompilaĵo estas varme rekomendata al la organizantoj de E-aranĝoj, ĉar necesas nur elekti „tagon“ kaj okazigi ekumenan preĝokunvenon; grandaj aranĝoj kiel Universala Kongreso, kaj simile jam havas pretan tekston por la Ekumena diservo

Ĉijare ni havas ankaŭ unikan eblecon uzi la tekstojn de la tuta Semajno okaze de la Ekumena Esperanto Kongreso (Trento, 16-23 de aŭgusto).

Gravas la mencio, ke la tekstoj ne estas nur por la semajno inter la 18a kaj 25a de januaro. Libere uzu ilin dum la tuta jaro, ĉar preĝi neniam sufiĉas. Se vi iel utiligos la tekstojn, bv. sciigi, ĉefe se vi havis iun alian ideon ol supre menciitajn.

Ĉe la fino de ĉi linioj, mi dankas al ĉiuj kuntradukintoj kaj mi esperas ke ĉi sperto estas kuraĝiga, kaj malfermis perspektivon por iu estonta simila laboro.

Pacon kaj bonon!

Marija Belošević, vicprezidantino de IKUE

- Fulda, Federacia Respubliko Germanio)
- * 1992: Mi estas kun vi ĉiujn tagojn... Iru do (Mateo 28,16-20)
(Materialo el Belgio - prepara kunsido en Bruĝo, Belgio)
 - * 1993: Porti la fruktojn de la Spirito por la unueco de kristanoj
(Galatoj 5.22-23)
(Materialo el Zairio - prepara kunsido apud Zuriko, Svislando)
 - * 1994: La familio de Dio: alvokata esti unu, kore kaj mense
(Agoj 4,23-37)
(Materialo el Irlando - prepara kunsido en Dublino, Respubliko de Irlando)
 - * 1995: Koinonia: komuneco en Dio kaj unu kun la alia
(Johano 15,1-17)
(Materialo el Fido kaj Konstiucio, prepara kunsido en Bristol, Anglio)
 - * 1996: Jen mi staras ĉe la pordo kaj frapas (Apokalipso 3,14-22)
(Prepara materialo el Portugalio, kunsido en Lisbono, Portugalio)
 - * 1997: Ni vin petegas pro Kristo, repaciĝu al Dio
(2 Korintanoj 5,20)
(Materialo de Nordia Ekumena Konsilantaro, prepara kunsido en Stokholmo, Svedio)
 - * 1998: La Spirito helpas nian malfortecon (Romanoj 8,14-27)
(Prepara materialo el Francio, kunsido en Parizo, Francio)
 - * 1999: Dio loĝos kun ili, kaj ili estos Lia popolo
(Apokalipso 21,1-7)
(Prepara materialo el Malajzio, kunsido en Monaĥejo de Bose, Italio)
 - * 2000: Benata estu Dio kiu benis nin en Kristo (Efesanoj 1,3-14)
(Prepara materialo de la Konsilantaro de la Eklezioj de Mezoriento, kunsido en La Verna, Italio)
 - * 2001: Mi estas la Vojo, la Vero kaj la Vivo (Johano 14,1-6)
(Prepara materialo de Rumanio kaj kunsido ĉe Vulcan, Rumanio)
 - * 2002: Ĉe Vi estas la fonto de vivo (Psalmoj 36,5-9)
(Prepara materialo CEEC kaj CEC, kunsido apud Augsburg, Germanio)
 - * 2003: Ni havas ĉi tiun trezoron en argilaj vazoj(2 Korintanoj 4,4-18)

- * 1980: Venu via regno (Mateo 6,10)
(Materialo de ekumena grupo en Berlino, Germana
Demokrata Respubliko - prepara kunsido en Milano)
- * 1981: Unu Spirito - diverseco de donacoj - unu korpo
(1 Korintanoj 12,3b-13)
(Materialo de Graymoor Fathers, Usono – prepara kunsido en
Genevo, Svislando)
- * 1982: Ke ĉiuj trovu sian hejmon en vi, ho Sinjoro (Psalmo 84)
(Materialo de Kenjo - prepara kunsido en Milano, Italio)
- * 1983: Jesuo Kristo – la Vivo de la Mondo (1 Johano 1,1-4)
(Materialo de ekumena grupo en Irlando - prepara kunsido en
Céligny (Bossey), Svislando)
- * 1984: Alvokitaj esti unu per la kruco de nia Sinjoro
(1 Korintanoj 2,2 kaj Kolosanoj 1,20)
(prepara kunsido en Venecio, Italio)
- * 1985: De morto al vivo kun Kristo (Efesanoj 2,4-7)
(Materialo el Jamaiko - prepara kunsido en Grandchamp,
Svislando)
- * 1986: Vi estos miaj atestantoj (Agoj 1,6-8)
(Materialo Slovenio)
- * 1987: Unuiĝinta en Kristo - Nova Kreitaĵo
(2 Korintanoj 5,17-6:4a)
(Materialo el Anglio, prepara kunsido en Taizé, Francio)
- * 1988: La amo de Dio elĵetas timon (1 Johano 4,18)
(Materialo el Italio - prepara kunsido en Pinerolo, Italio)
- * 1989: Konstrui komunumon: unu korpo en Kristo
(Romanoj 12,5-6a)
(Materialo el Kanado - prepara kunsido en Whaley Bridge,
Anglio)
- * 1990: Ke ili ĉiuj estu unu ... Ke la mondo kreu (Johano 17)
(Materialo el Hispanio - prepara kunsido en Madrido, Hispanio)
- * 1991: Gloru la Eternulon ĉiuj popoloj!
(Psalmo 117 kaj Romanoj 15,5-13)
(Materialo el Germanio - prepara kunsido en Rotenburg der

Ĉu Kristo estas dividita? (1 Kor 1,1-17)

Paŭlo, vokita por esti apostolo de Jesuo Kristo per la volo de Dio, kaj Sostenes, nia frato, al tiu eklezio de Dio, kiu estas en Korinto, al tiuj, kiuj estas sanktigitaj en Kristo Jesuo, vokitaj por esti sanktuloj, kune kun ĉiuj, kiuj en ĉiu loko vokas la nomon de nia Sinjoro Jesuo Kristo, ilia Sinjoro kaj nia: Graco estu al vi kaj paco de Dio, nia Patro, kaj de la Sinjoro Jesuo Kristo. Mi ĉiam dankas mian Dion pri vi, pro la graco de Dio al vi donita en Kristo Jesuo; ke en ĉio vi riĉiĝis en li, en ĉia parolo kaj ĉia scio; kiel ankaŭ la atesto de Kristo konfirmiĝis en vi; tiel, ke vi malatingas nenian donacon; atendente la malkaŝon de nia Sinjoro Jesuo Kristo, kiu ankaŭ konfirmos vin ĝis la fino, por ke vi estu neriproĉeblaj en la tago de nia Sinjoro Jesuo Kristo. Fidela estas Dio, per kiu vi estas alvokitaj en la kunulecon de Lia Filo Jesuo Kristo, nia Sinjoro. Mi petegas vin, fratoj, per la nomo de nia Sinjoro Jesuo Kristo, ke vi ĉiuj parolu tion saman, kaj ke estu neniaj skismoj inter vi; sed ke vi estu perfekte kunigitaj en la sama spirito kaj en la sama juĝo. Ĉar pri vi, miaj fratoj, estas sciigite al mi de la domanoj de Ĥloe, ke ekzistas inter vi malpacoj. Kaj la jenon mi volas diri, ke ĉiu el vi diras: Mi estas de Paŭlo; kaj mi de Apolos; kaj mi de Kefas; kaj mi de Kristo. Ĉu Kristo estas dividita? ĉu Paŭlo krucumiĝis por vi? aŭ ĉu vi baptiĝis en la nomon de Paŭlo? Mi dankas Dion, ke mi baptis neniun el vi krom Krispo kaj Gajo; por ke neniun diru, ke vi baptiĝis en mian nomon. Kaj mi baptis ankaŭ la familion de Stefanos; krom tio mi ne scias, ĉu mi baptis iun alian. Ĉar Kristo sendis min, ne por bapti, sed por prediki la evangelion; ne en saĝeco de vortoj, por ke la kruco de Kristo ne vantiĝu.

TEOLOGIA-PAŜTISTA ENKONDUKO

Kristo ne povas esti dividita! (1 Kor 1, 1-17)

1. Ni Kanadanoj vivas en lando markita de malsamecoj pri lingvo, kulturo, kaj eĉ pri klimato, kaj ni enkorpigas la diversecon ankaŭ en niaj esprimoj de la kristana kredo. Vivi en tia ĉi varienco, sed ankaŭ esti fidelaj al la deziro de Kristo por la unueco de liaj disĉiploj, kondukis nin pripensi pri la sendiskuta aserto de Paŭlo en la *Unua letero al Korintanoj*: “Kristo ne povas esti dividita!”. Tion ankaŭ ni asertas kun fido, tamen niaj komunumoj daŭrigas estigi skandalajn disigojn. La *Unua letero al Korintanoj* krome atentigas pri la maniero, en kiu ni povas valorigi kaj ricevi la donacojn de la aliuloj, ankaŭ nun en nia disa stato, kaj tio mem konsistigas kuraĝigon en la strebo al unueco.

2. Kanado estas fama pro sia mirinda pejzaĝo: la montoj, la arbaroj, la lagoj kaj la riveroj, la tritiko-etendaĵoj, kaj la bordoj de tri oceanoj. Nia lando etendiĝas de la Atlantika al la Pacifika oceanoj, kaj de la landlimo de Usono ĝis la Norda Poluso. Ĝi estas lando riĉa je agrikulturo kaj naturaj rimedoj. Kanado estas ankaŭ lando de malsamaj rasoj: la Praaj Naskiĝintoj (*First Nations*), la Inuitoj (*Inuit*)¹.

Mestizoj kaj de pluraj popoloj alvenintaj de ĉiu parto de la mondo. Estas du oficialaj lingvoj: la franca kaj la angla, kaj, krome, multaj kanadanoj celebras la lingvan kaj kulturan heredaĵon el la landoj de siaj praaĵoj. Niaj sociaj kaj politikaj dividoj dependas ofte de lingvaj, kulturaj kaj regionaj distingo, tamen ni estas lernantaj kompreni, kiamaniere ĉi tiuj naciaj identecoj kontribuas al saniga diverseco en Kanado. En ĉi tiu plurkultura panoramo multaj kristanoj alportis sian apartan stilon de kulto kaj servo. La *Letero* de Paŭlo sin turnas al ni, en nia diverseco kaj instigas nin agnoski, ke ni, kiel loka eklezio, devas ne esti izolitaj aŭ agi la unuj kontraŭ la aliaj, sed prefere rekoni reciproke kunligon kun ĉiuj, kiuj alpreĝas la nomon de la Sinjoro.

3. En la ĉijara teksto – la *Unua letero al Korintanoj* – Paŭlo komencas per ege impresa aserto. Kiel la uverturo de opero aŭ la malferma movimento de simfonio, ĉi tiu teksto tuŝas la temojn, kiuj sendube

PREĜOSEMAJNO POR LA UNUECO DE LA KRISTANOJ TEMOJ 1968-2014

En 1968, estis unue uzitaj materialoj kune preparitaj de la Komisiono pri Fido kaj Konstitucio de la Monda Konsilio de Eklezioj, kaj la Papa Konsilantaro pri la Antaŭenigo de Unueco de la Kristanoj .

- * 1968: Por laŭdo de Lia gloro (Efesanoj 1,14)
- * 1969: Vokitaj al libereco (Galatoj 5,13)
(Prepara kunsido en Romo, Italio)
- * 1970: Ni estas kunlaborantoj kun Dio (1 Korintanoj 3,9)
(Prepara kunsido ĉe la monaĥejo de Niederaltaich, Federacia Respubliko Germanio)
- * 1971: ... kaj la kuneco de la Sankta Spirito (2 Korintanoj 13,13)
- * 1972: Novan ordonon mi donas al vi (Johano 13,34)
(Prepara kunsido en Ĝenevo, Svislando)
- * 1973: Sinjoro, instruu nin preĝi (Luko 11,1)
(Prepara kunsido ĉe la abatejo de Montserrat, Hispanio)
- * 1974: Ĉiu lango konfesu, ke Jesuo Kristo estas Sinjoro (Filipianoj 2,1-13) (Prepara kunsido en Ĝenevo, Svislando)
- * 1975: La celo de Dio: sumigi en Kristo ĉion (Efesanoj 1,3-10)
(Materialo de aŭstralia grupo. Prepara kunsido en Ĝenevo, Svislando)
- * 1976: Ni estos similaj al li; (1 Johano 3,2) aŭ, Alvokita fariĝi tio, kio ni estas
(Materialo de Kariba Konferenco de Eklezioj. Prepara kunsido en Romo, Italio)
- * 1977: Kune elteni en espero (Romanoj 5,1-5)
(Materialo el Libano, dum interna milito. Prepara kunsido en Ĝenevo)
- * 1978: Jam ne fremduloj (Efesanoj 2,13-22)
(Materialo de ekumena grupo en Manĉestro, Anglio)
- * 1979: Servu unu al la alia por la gloro de Dio (1 Petro 4,7-11)
(Materialo el Argentino - prepara kunsido en Ĝenevo, Svislando)

- * 1964: La „Dekreto pri ekumenismo“ de la Dua vatikana konsilio substrekas ke la preĝo estas spirito de la ekumena movado kaj ĝi subtenas Preĝosemajnon por unueco
- * 1966: La Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ de la Tutmonda konsilio de Eklezioj kaj la Sekretariejo por la unueco de la kristanoj (hodiaŭ Papa konsilio por antaŭenigo de la unueco de la kristanoj) decidis kune pretigi oficialajn tekstojn por la Preĝosemajno
- * 1968: la unuan fojon la preĝo por la unueco okazis surbaze de la komunaj tekstoj kiujn pretigis „Fido kaj Konstitucio“ kaj Sekretariejo por antaŭenigo de la unueco de la kristano (hodiaŭ Papa konsilio por antaŭenigo de la unueco de la kristanoj)
- * 1975: La preĝo por la unueco la unuan fojon okazis surbaze de la tekstoj kiujn pretigis loka ekumena grupo: la bazan tekston tiun jaron pretigis la ekumena grupo el Aŭstralio
- * 1988: La materialoj por la Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj estis uzataj ĉe la diservo okaze de la fondo de la Kristana interligo de Malajzio, organo kiu kunligas pli grandajn kristanajn grupojn en tiu lando
- * 1994: La teksto por tiu jaro estis pretigita kunlabore kun la laikaj ekumenaj unuiĝoj de kristana junularo Kristana unuiĝo de la vira junularo (YMCA) kaj Kristana unuiĝo de la ina junularo (YWCA)
- * 2004: La Papa konsilio por antaŭenigo de la kristanoj (Katolika Eklezio) kaj Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ de la Tutmonda konsilio de eklezioj (WCC) atingas interkonsenton kiu plifortigas la kunlaboron, ke la materialo por la Preĝosemajno por la unueco en la angla kaj francaj lingvoj estos komune kaj preparita kaj eldonita
- * 2008: en la tuta mondo oni celebris 100 jarojn de la Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj
- * 2010: Estas solene celebrata en Edinburgo kaj en la tuta mondo, per diversaj eventoj, la unua jarcento de la misia Konferenco de Edinburgo, dato kiu markas ankaŭ la komencon de la moderna ekumena Movado

pretigas nin al tio, kio estos la enhavo de la Letero. Estas tri movimentoj en tiu teksto. Ĉiuj tri starigas solidan kaj allogan fundamenton por nia prikonsidero, kiel kristanoj vivantaj kaj agantaj kune en la eklezioj kaj en la hodiaŭa societo.

4. En la unua movimento (1, 1-3) Paŭlo, kune kun sia kristana amiko Sostenes – kiel eta, sed aŭtenta duopa komunumo – sin turnas al alia komunumo, multenombra kaj tre agema, la kristanoj de Korinto. Li nomas ilin “Eklezio de Dio”, ne nur kiel lokan sekcion, sed kiel plenan esprimon de la Eklezio en tiu monda parto. Paŭlo memorigas al ili, ke ili estas vokitaj por esti “unuigitaj al Jesuo Kristo”, ne izolitaj tute sendepende, sed “iĝintaj popolo de Dio, kune kun ĉiuj kiuj, kie ajn ili estas, vokas la nomon de Jesuo Kristo, nia Sinjoro”.

Ili estas aŭtente la Eklezio de Dio, sed forte kunligita kun iu ajn, kiu vokas la nomon de la Sinjoro, ĉu en sia konfeso, ĉu en sia loko. Sekve, Paŭlo, tiel kiel li faras en ĉiuj siaj Leteroj, etendas siajn kutimajn salutojn je graco de la Sinjoro kaj je paco. En la lingvaĵo de Paŭlo “graco” indikas la bonon kaj la donacojn de Dio al ni en Kristo, kaj celas al la esprimo de nia danko al Dio kaj al nia donemo al la aliuloj. Lia “paco” por ni, en tuta sia pleneco kaj mutualemo, estas la komuneco (*koinonia*) en Dio.

5. Kie vi ekvidas la gracon de Dio kaj la pacon en via loka eklezio, en via plej ampleksa komunumo kaj en via lando? Kiel vi povas preterpasi la zorgojn por via plej proksima komunumo kaj ekzorgi pri la komunumo de ĉiuj kristanoj kaj de la mondo?

6. Dum Paŭlo ekvokas la komunumon de Korinto al ĉi tiu tasko, komenciĝas la sekva movimento de la teksto (1, 4-9) per dankesprimado al Dio ĉar “Li donis sian gracon” al Korintanoj “pere de Kristo Jesuo”. Ne temas nur pri formalajaĵo, sed pri aŭtenta ĝojiĝo por la donacoj donitaj de Dio al la komunumo. Paŭlo daŭrigas kuraĝigante ilin: “pere de li, li riĉiĝis vin per ĉiuj siaj donacoj [...]. Pro tio al vi mankas neniu el la diaj donacoj”.

Ili estas certigitaj, ke ili ricevos la persistecon ĝis la fino kaj ke “Dio plenumas siajn promesojn”. Dio vokas nin al la komuneco

(*koinonìa*) kun Sia Filo, kune kun ĉiuj spiritaj kaj sociaj implicoj por niaj eklezioj kaj por la popoloj.

7. Kiel kanadaj kristanoj, ni konscias, ke ne ĉiam ni estis pretaj ekĝoji pro la donacoj de Dio ĉeestantaj en aliaj kristanaj komunumoj. Legante la tekston de Paŭlo kun ekumena emo, ni iĝas pli konsciaj pri la instigo al sincera ĝojigo pro la maniero per kiu Dio benis aliajn kristanojn kaj aliajn popolojn. Tiuj, kiuj unue alportis la kristanan fidon en Kanadon, ofte rifuzis la donacojn kaj la vidpunktojn de la indiĝenaj popoloj, kaj ne kapablis ekkoni la benojn, kiujn Dio estis disdonacanta pere de ili.

Ni devas esti tre dankemaj pro la diverseco de popoloj kaj de fidesprimoj en nia lando. Malgraŭ ke nia historio registras multajn okazojn, en kiuj ni ne vivis en reciproka respekto kaj en la reciproka subteno, ni scias, ke nia lando baziĝas sur la kunlaboro kaj sur la irado laŭ pacvojoj en la lando kaj en la mondo. Nia ĝojo pro la benoj de la natura mondo, kiaj pro donacoj de la Sinjoro estas tro ofte taksata kiel normala, kaj ni klopodas por pluteni ekvilibron inter evoluigo kaj gardado de la kreitaĵo. Ni klopodas ankaŭ por efektivigi la valorojn, kiujn ni ĉiuj asertas havi kiel kanadanoj. Kiel kristanoj kaj kiel eklezioj, ni sentas nin vokataj al atenta dankemo por la donacoj de Dio en la aliulojn, kaj al dankesprimo kaj zorgo pri la tuta lando kaj pri la mondo.

8. *Por kio vi dankesprimas en via eklezio, en via komunumo en via lando? Kiamaniere vi spertis la diajn donacojn spiritajn kaj/aŭ materiajn inter aliaj kristanoj aŭ aliaj homoj de via komunumo?*

9. En la tria movimento de la teksto (1, 10-17) Paŭlo adresas malmolajn vortojn al Korintanoj pro la maniero per kiu ili distordis la kristanan evangelion kaj disrompis la unuecon de la komunumo “[...]unu el vi diras ‘mi estas de Paŭlo’; alia ‘mi estas de Apolos’; tria asertas ‘mi estas de Kefas’”. Eĉ tiuj, kiuj deklaras esti de Kristo, ne estas laŭdataj de Paŭlo, ĉar ili uzas la nomon de Kristo por sin disigi el la aliaj ene de la kristana komunumo. Ni ne povas voki la nomon de Kristo por starigi muron ĉirkaŭ ni, ĉar lia nomo naskas fratecon kaj unuiĝon, ne dividojn. “Kristo ne povas esti dividita!”

KELKAJ GRAVAJ DATOJ EN LA HISTORIO DE LA PREĜOSEMAJNO POR LA UNUECO DE LA KRISTANOJ

- * ĉ. 1740: En Skotlando, pentekosta movado ligita kun Nord-Ameriko, kies refervoriga mesaĝo entenas preĝojn por kaj kun ĉiuj eklezioj
- * 1820: Sac. James Haldane Stewart publikigis „Sugestojn por la Ĝenerala Unio de kristanoj cele al la elfluo de la Spirito“ (Hints for the outpouring of the Spirit)
- * 1840: Sac. Ignatius Spencer, konvertito al la Roma Katolikismo, sugestas „Unuiĝon de preĝado por Unueco“
- * 1867: La Unua Konferenco de anglikanaj episkopoj en Lambeth emfazas preĝadon por unueco en la enkonduko de siaj rezolucioj
- * 1894: Papo Leono la 13-a kuraĝigas praktikon de la Preĝosemajno por la unueco kadre de festo de Pentekosto
- * 1908: Unua okazigo de la „Preĝosemajno por la unueco de Eklezio“ en la januara tempo kaj laŭ hodiaŭa maniero iniciatita de sac. Paul Wattson
- * 1926: La Movado „Fido kaj Konstitucio“ komencas publikigon de „Sugestoj por preĝosemajnoj por la unueco de la kristanoj“ okaze de Pentekosto
- * 1935: En Francio katolika pastro Paul Couturier laboras por Ĝenerala semajno de preĝo por la unueco de la kristanoj bazita sur la komuna preĝo por „unueco kian Kristo deziras, per agoj kiujn Li deziras“
- * 1941: Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ translokas la preĝon al januaro konforme al antaŭaj katolikaj iniciatoj, por ke kristanoj povu komune preĝi en la sama jarsezono
- * 1958: La Ekumena centro „Kristana unueco“ el Liono en Francio komencis pretigi materialon por la Preĝosemajno kunlabore kun la Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ de la Tutmonda (Ekumena) Konsilio de Eklezioj
- * 1964: Papo Paŭlo la 6-a kaj patriarĥo Atenagora la 1-a en Jerusalemo kune preĝas preĝon de Jesuo „ke ĉiuj estu unu“ (Joh 17, 21)

praktiko, teni niajn proprajn religiajn trajtojn. Ankoraŭ daŭras nia pilgrimado al unueco sub Dia gvido.

La aspiroj, esprimitaj en ĉi tiu preĝo el la centjara jubileo de Kanado en la jaro 1967 ankaŭ nuntempe plurespegulas la modernan kanadan karakteron:

„Ni preĝu kaj vivu por mondo, en kiu homoj de ĉiuj nacioj estu unuigintaj per penso, vorto kaj farado; helpu al ni esti sinceraj, puraj kaj amemaj en niaj rilatoj kun aliaj en nia mondo kaj en ĉiuj mondoj. Ni preĝu por harmonio kaj memperfektigo por ĉiu animo en tiu ĉi nacio kaj en ĉiuj nacioj; helpu al ni labori kaj vivi tiel, ke malsato, malriĉeco, malscio kaj malsano malaperu kaj Via regno venu. Amen.“

³⁾ Tiu ĉi teksto estis reproduktita sub la sola aŭtoritato kaj respondeco de la ekkomuna grupo en Kanado, kiu kunvenis por skribi la provizajn tekstojn por la Semajno de preĝado por kristana unueco 2014.

⁴⁾ „First Nations“ (unuaj gentoj) estas termino uzata en Kanado, priskribanta la indiĝenajn homojn, kiuj loĝis en la lando antaŭ la alveno de la unuaj eŭropanoj. La indiĝenoj en la Arktiko nomas sin mem „Inuit“. „Métis“ estas termino uzata por priskribi la idojn de indiĝenoj kaj francoj.

⁵⁾ Spektu <http://trc.ca> por pliaj informoj pri Indian Residential Schools kaj la interkonsento pri setlado.

Paŭlo ne kontestas la formiĝo de komunumo ĉirkaŭ fortika gvidanto, sed la komunumo devas trovi la bazon de sia identeco en Kristo: “Kaj Paŭlo, interalie, ne estis krucumita por vi. Kaj neniu vin baptis en la nomo de Paŭlo”, la domanoj de Ĥloe rimarkis ĉi tiun distordon kaj ĝin diskonigis.

10. En ĉi tiu situacio de divido, alvenas la instigo de Paŭlo: “mi petas vin, ke vi vivu konkorde [...] estu unuigitaj: havu la samajn pensojn kaj la samajn konvinkojn”. Ĉu Paŭlo pensas, ke ĉiuj devas preĝi kaj agi sammaniere? Ni pensas ke ne. Ĉi tiuj versikloj, ne estas peto forlasi la gvidadon de Paŭlo, Apolo aŭ Kefas. Enradikitaj en Kristo, ni estas petataj danki por tiuj donacoj de Dio, kiujn aliaj, ekster nia grupo, alportas al la komuna misio de la eklezio. Honori la donacojn de aliuloj, apudiĝas nin en la fido kaj en la misio kaj kondukas nin al tiu unueco, por kiu Jesuo preĝis, laŭ la respekto de la aŭtenta malsameco pri la kulto kaj la vivo.

11. Paŭlo substrekas du centrajn elementojn en la kristana disĉipleco, per kiuj ni estas fortike ligitaj al Kristo: La bapto kaj la kruco de Kristo. Ni ne estis baptitaj en la nomo de Paŭlo, kaj ne li esti krucumita por ni; nia unuigo estas en Kristo kaj nia vivo kaj nia savo devenas de li. Samtempe ni estas anoj de unu aŭ alia grupo, kaj niaj lokaj eklezioj nutras nin en la fido kaj helpas nin paŝi kiel disĉiploj de Kristo. Konklude, por Paŭlo kaj por ni, nia celo, ne estas nur nia sento de aparteno al aparta eklezio, sed pli propre la proklamado de la sava anonco, la evangelio mem, al kiu ni respondis fide kaj ĝoje. Nun ni devas kunpartigi ĉi tiun mesaĝon kun la mondo. La konkludo de Paŭlo defias nin sinpeti ĉu ni vere alportas la savan anoncon de Kristo, unu al la alia, aŭ ĉu ni alportas dividojn eĉ en la nomo de Kristo, tio estas, laŭ la vortoj de Paŭlo, malplenigante la krucon de ĝia povo.

12. Kiel kanadaj kristanoj, ni havas grandan historion pri kunlaboro kaj reciproka subteno. Nia historio entenas ekzemplojn de komunaj streĉoj, kunpartigitaj servoj, kaj ankaŭ de unuigo inter pluraj eklezioj. Kiam ne eblis la organisma unuigo inter eklezioj, ni ofte atingis

komunajn akordiĝojn kaj kunpartigis oficojn, atestante nian kreskantan unuiĝon en Kristo. Niaj eklezioj agis kune pri aferoj rilataj la malriĉecon kaj la socian justecon, kaj multaj el niaj eklezioj komencis surprizi kune la respondecon pri niaj kondutoj direkte al la indiĝenaj popoloj kaj tute nekonformaj al la Kristo-instruado. Tamen, malgraŭ ĉi tiu kuraĝiga irado al la unueco laŭ la deziro de Kristo, ankoraŭ persistas dividoj kaj malkuniĝoj, kiuj fuŝas nian proklamon de la evangelio.

13. Ni ankaŭ aŭskultis la averto de la domanoj de Ĥloe. Estas sub la estrado de Ĥloe, ke tiu grupo identigas kaj nomas la konfliktojn kaj dividojn en la eklezio de Korinto. Daŭre ni bezonas tiajn atestantojn, homojn de ĉiu eklezio, kaj ilian servon al repacigo kaj al unuiĝo. Konigi ĉi tiun ateston apudigos nin al la plenumo de la paŭla vido pri komunumo havanta “la samajn pensojn kaj la samajn konvinkojn” en Kristo.

14. Kiamaniere vi kaj via Eklezio povas havi la samajn pensojn kaj la samajn konvinkojn en Kristo kun la aliaj eklezioj? Kiamaniere via estimo kaj via sperto pri pluraj kontaktoj kaj celebradoj inter la eklezioj de via komunumo kaj de via lando estigas rezultojn en la streboj al la videbla unuiĝo de la kristanoj? Kiun komunan mision vi povas kunpartigi kun la aliaj kristanoj, por ke la mondo fariĝu pli bona loko por la aliaj?

15. Konklude, kiam ni prikonsideras la multajn benojn kaj donacojn de Dio ĉeestantajn en nia lando kaj en niaj popoloj, ni komencas kompreni, ke ni devas trakti nin reciproke kaj trakti la teron mem, el kiu ni deprenas nian vivtenado, kun digno kaj respekto. Ĉi tiu konsciigo alvokas nin al konfeso, al pento, al la serĉado de novaj kaj elteneblaj vivmanieroj sur la tero, kaj konsciigas nin, ke Dio benis nin ĉiujn, kaj ke neniuj homgrupo povas decidi pri la utiligo de la landaj rimedoj, sen aŭskulti kaj akcepti la voĉojn de siaj samlandanoj.

¹ Praaj Naskiĝintoj (*First Nations*) estas esprimo uzata en Kanado por indiki la indiĝenaj popoloj, kun la konscio pri ilia ĉeesto antaŭ la alveno de la Eŭropanoj. La indiĝenaj popoloj de la arka zono sin nomas *Inuit*. Mestizoj estas vorto uzata por indiki popolojn, kies praaĵoj estas indiĝenoj kaj francoj.

travivas defiojn kaj benojn de la laboro por kristana unueco kaj ofte estras en ekumenaj organizoj.

Elstaraĵo el pasinttempa ekumena vivo estis la kreskanta inkluzivado de evangeliaj eklezioj kaj pastoroj en ekumenaj kunvenoj, ekumenaj diservoj kaj dialogoj, kaj en komunumaj organizoj. Post periodo de interna evangeliana alproksimiĝo, ni nun alfrontas eblojn por novaj dialogaj partnerecoj inter la historiaj ĉefaj protestantaj eklezioj, evangelianoj, pentekostanoj, okcident- kaj orientotodoksanoj kaj romkatolikoj. Evangeliaj eklezioj en Kanado etendas la manon, serĉante interkompreniĝon, eblojn diservi komune kaj kunlaboron kiel atesto por niaj urboj. Eklezioj nun frontas kutiman realon, en kiu ili ne plu havas la socian influon, kiun ili iam posedis. Kaj por multaj historiaj eklezioj la nombro de membroj dramece malaltiĝas.

Diferencoj ene de la kristana komunumo pri la prioritato aŭ neceso de evangelizado de homoj el aliaj vivantaj konfesioj daŭre estas faktoroj, kiuj malfaciligas kunlaboron.

Tamen, kristana kunlaboro en interreligia dialogo pligrandiĝis dum la pasintaj jaroj kaj ofte estas farata kunlabore inter la eklezioj. Ĉu Kristo estis disdividita en Kanado? Oni certe povus diri, ke ekzistas disdivideco inter kristanoj en Kanado. La kristana komunumo malinterkonsentas pri la rolo de virinoj kaj en la eklezio kaj en la socio, same kiel pri etikaj temoj kiel abortigo, eŭtanazio kaj samseksema edziĝo. Multaj el tiuj separigaj temoj krucigas la interkonfesiajn limojn. Tamen, alfrontante novajn sociajn defiojn, kelkaj religiaj komunumoj komencis interrilati kun siaj najbaroj laŭ novaj, pozitivaj manieroj. Kanada historio atestis periodojn de streĉado kaj rivalleco, de vivo plena je ignoremo kaj indiferenteco de unu kontraŭ la alia. Per ĉio ĉi ni lernis konsideri la valorojn de la aliulo por kune vivi en paco. Ni daŭrigas, disdividitaj per doktrino, politiko kaj

eniri dialogon kun iliaj kristanaj gefratoj, rigardante, ke la respondecado pri la disigeo estas dividita de ambaŭ flankoj. Eksciinte pri la ĉiumonataj renkontiĝoj inter protestantaj pastoroj kaj katolikaj sacerdotoj organizitaj en Montreal fare de Fr. Beaubien, komenciĝintaj en 1958, Monda Konsilantaro de Eklezioj decidis okazigi la kvaran konferencon pri kredo kaj ordo en ĉi tiu urbo en 1963. Tiu ĉi kunveno de pli ol 450 teologoj el multaj konfesioj kaj landoj, kore bonvenigitaj pere de plejparte katolikaj civitanoj, iĝis ĉefe ekumena aranĝo. Vespero pri kristana adepteco, okaziginta en la universitato de Montreal, renkontigis 1500 kristanojn. Dum la Tutmonda Ekspozicio, Expo 67 en Montreal, la ĉefaj eklezioj de Kanado flankenmetis la kutimon pri apartaj standoj kaj komune prezentiĝis en unu komuna „kristanara pavilono“. En la historio de Tutmondaj Ekspozicioj tiu ĉi estis la unua fojo, ke ekumena pavilono estis efektivigita.

Aliaj ekumenaj grupoj fondiĝis post la Dua Vatikana Koncilio kaj dum la sekvantaj jardekoj: „Atlantic Ecumenical Council“ (t.e. Atlantika ekumena konsilantaro) (1966), „Quebec Ecumenical Network“ (t.e. Kebeka ekumena reto) (1982) kaj „Prairie Centre for Ecumenism“ (t.e. Preria centro por ekumenismo) (1984) estas aparte menciindaj. La Prairie Centre for Ecumenism, fondita en Saskatoon fare de Fr. Bernard de Margerie, estas subtenata per sep konfesioj. Ĝia ĉefcelo estas ekumena edukado kaj formado kaj ĝi funkcias kiel nacia provizanto al ESM. En la tuta lando loka ekumenismo estas subtenata per servaj grupoj en kamparaj komunumoj kaj urbaj najbararoj, same kiel per multaj konsilantaroj de eklezioj. Diversaj ekumenaj iniciatoj prosperas en la lando: komuna festado de la „Week of Prayer for Christian Unity“ (Semajno de preĝado por kristana unueco), komunaj formadoj en teologiaj fakultatoj, aktiviĝo pri paco kaj socia justeco, publikaĵoj, ktp. Kiel integra parto de poreklezia vivo en Kanado, interekleziaj familioj

Preparado de la materialo por la Semajno unueco de la kristanoj 2014

La unua redaktado de la teksto estis verkita de grupo de reprezentantoj de malsamaj kanadaj regionoj, starigita laŭ invito de la *Canadian Centre for Ecumenism* kaj de la *Prairie Centre for Ecumenism*.

Ni deziras precipe danki:

- * Ms. Bernice Baranowski (katolika), *Centre canadien oecuménisme*, Montreal;
- * Rev. Dr. Sandra Beardsall (*United Church of Canada*), docento pri Historio de la Eklezio, *St. Andrew's College*, Saskatoon;
- * Rev. Michel Beizile (baptista), *Greenborough Community Church*, Toronto;
- * S.E.R. Donald Bolen, episkopo, katolika Diocezo de Saskatoon;
- * Rev. Amanda Currie, ministro kaj dungito de la *Presbytery of Northern Saskatchewan, Presbyterian Church in Canada*, Saskatoon;
- * Nicholas Jesson, ekumena delegito, katolika Diocezo de Saskatoon;
- * Norman Lévesque (katolika), plenuma direktoro (*ad interim*) de la *Centre canadien d'oecuménisme* kaj direktoro de la programo *Green Church*;
- * Rev. Diakono Anthony Mansour (ortodoksa Eklezio en Ameriko), plenuma direktoro (2006-2012), *Centre canadien oecuménisme*, Montreal;
- * Rev. D-ro. David MacLachian (*United Church of Canada*), docento pri Nova Testamento, *Atlantic School of Theology*, Halifax;
- * Rev. John Wilson (*United Church of Canada*), Summerside, Prince Edward Island.

Kontribuis al la komenca redakcia proceso per interesaj proponoj:

- * Rev. D-rino. Karen Hamilton (*United Church of Canada*), ĝenerala sekretariino, *Canadian Council of Churches*;
- * Rev. D-ro Gilles Routhier (katolika), dekanano, *Faculté de Théologie et de Sciences Religieuses*, Université Laval, Québec.

Ni estas tre dankemaj al la episkopo de Saskatoon, S.E.R. Donald Bolen, por la preparado de la loka Grupo kaj al ĉiuj, kiuj donis asistadon al la laboro de la internacia Komisiono.

La proponata materialo estis finpretigita dum renkontiĝo de la internacia Komisiono Fido kaj Konstitucio (Ekumena Konsilio de la Eklezioj) kaj de la Papa Konsilio por la progreso de la Unuiĝo de la Kristanoj (Katolika Eklezio). La Komisiono renkontiĝis kun la loka kanada grupo en Septembro 2012 en *Villa Saint Martin*, jezuita retiriĝejo en Pierrefonds, nord-okcidente de la insulo Montreal.

Ni estas precipe dankemaj al *Canadian Centre for Ecumenism* kaj al *Prairie Centre for Ecumenism* pro la oferema gastigo de la renkontiĝo kaj por la organizo de la vizito al *Oratoire Saint Joseph* en Montreal. Ni deziras, krome, esprimi nian dankon al la Fakultato de la *MacGill University*, Montreal, pro la organizo de ekumena Simpozio dum nia restado en Kanado.

Kanado), „KAIROSCanadian Ecumenical Justice Initiatives“ (KAIROS kanadaj ekumenaj iniciatoj por justeco), la „Canadian Churches' Forum on Global Ministries“ (forumo de kanadaj eklezioj pri tutmondaj religiaj servoj) kaj aliaj helpadis al la eklezioj kaj registaro per esplorado kaj aktiviĝo en multspecaj laborkampoj.

La „Canadian Centre for Ecumenism“ (t.e. kanada centro pri ekumenismo) estis fondita fare de Fr. Irénée Beaubien en Montreal en 1963 en tre vigla franca kaj angla cirkonstancoj. Ĝi provizas naciajn amaskomunikilojn kiel „*Ekomunism* magazine“ (t.e. Ekonomismo – gazeto), kiu estas publikigita en franca kaj angla versioj, kaj havas legantaron en kvardek landoj. La konstanta sentemo de la centro pri sociaj movadoj montriĝas per la nova programo „Green Church“ (t.e. verda eklezio), kiu asistas ekleziojn el ĉiuj konfesioj iĝi pli bonaj prizorgantoj de la kreitaro.

La alvoko de la Dua Vatikana Koncilio en la fruaj 1960-aj jaroj pozitive influis la kreskon de ekumenismo en Kanado. Kanadaj ekumenaj kompreniĝoj kaj spertoj evidentiĝas en la pastra letero titolita „*Chrétiens désunis*“ (*Malunuigitaj kristanoj*) de kardinalo Paul-Émile Léger, ĉefepiskopo de Montreal. Léger ne postulis konvertiĝon de la protestantoj al katolikismo, sed li invitis katolikojn preĝi por unueco, ĉefe per la revigligo kaj konvertiĝo de la katolika eklezio mem. Per vortoj anticipantaj la Duan Vatikanan Koncilion, la kardinalo proklamis, ke „*la strebado al unueco iĝas la plej grava celo de la nuntempa kristanaro*“ kaj, ke tiu ĉi plej grava movado „*naskiĝis per instigo fare de la Sankta Spirito*“. Per tiu rigardo al la mistero de unuigiteco kaj malunuigiteco de la kristanaro li substrekkis, ke ĉiuj valide baptitaj personoj „*estas inkluditaj en Kristo, kaj iĝas unu korpo kun li*.“ Li ankaŭ menciis, ke, rigardante la esprimitan volon de Kristo, malunuigo estas „*skandalo*“ kaj „*malbono*“. Tiamaniere la episkopo urĝis sian adeptaron preĝi pri unueco, kaj

du aŭ pliaj konfesioj kundividas konstruaĵojn, paŝtistojn kaj programojn, kiuj organizas diservojn ĉiusemajne.

Dudek kvar konfesioj kuniĝas en „Canadian Council of Churches“ (CCC) (t.e. Kanada Konsilantaro de Eklezioj). Tiu ĉi estas unu el la plej vastaj kaj plejinkluzivantaj ekleziaj konsilantaroj en la tuta mondo, al kiu apartenas anglikanaj, katolikaj, reformitaj, evangeliaj, libereklezia, okcident- kaj orientortodoksaj tradicioj. CCC, kiu utiligas perinterkonsentan modelon de decidado, estis fondita en 1944 kaj ĝia interkonfesia membraro reprezentas 85% de la kristanoj en Kanado. Gravus menciigi, ke la kanada konferenco de katolikaj episkopoj estas plenrajta membro de CCC same kiel ses evangeliaj konfesioj. La „Evangelical Fellowship of Canada“ (EFC) (t.e. Evangelia Komunumaro de Kanado) kunigas konfesiojn, religiajn servojn kaj lokajn kongregaciojn el la evangeliaj kaj pentekostaj konfesaroj. Kelkaj eklezioj estas membroj aŭ observantoj kaj de CCC kaj de EFC. Ĉi tiuj du asocioj komune kunlaboris pli proksime dum la pasintaj jaroj.

Multaj kanadaj eklezioj aktivas en du- aŭ pliflankaj rilatoj kaj sur nacia kaj sur loka nivelo. La plej grava asociiĝo estis la kuniĝo de multnombraj presbiteriaj, metodistaj kaj kongregationalistaj eklezioj en 1925 kaj el tio ekestis la Unuiĝinta eklezio de Kanado. Sed ankaŭ multaj aliaj formoj de komunumoj evoluiĝis, inkluzive de la „Anglican-Lutheran *Waterloo Declaration*“ (t.e. Anglikana-luterana Waterloo Deklaracio) pri la plena integriĝo en 2001. La kanadaj teologiaj interkonsentoj kontribuis al loka studado kaj respektado, kaj kundividis siajn sperton en internaciaj dialogoj.

Unu el la multaj plibonigaj aspektoj de kanada ekumenismo, kiu komenciĝis en la 1960-aj jaroj, estas la formiĝo de pli ol kvindek interekleziaj koalicioj koncerne socian justecon.

„Project Ploughshares“ (projekto plugildividado), la „Women’s Interchurch Council of Canada“ (virina intereklezia konsilantaro de

EKUMENA DISERVO

P: Prezidanto(j)

K: Kunveno

1. Ni kunvenas en espero kaj unueco

Procesia Himno

La prezidantoj de la diservo kaj aliaj povas eniri procesie.

Kunveno de la komunumo

P: Ke Dio, nia Patro, kaj Jesuo Kristo, la Sinjoro, koncedu al vi gracon kaj pacon (laŭ 1 Kor 1, 3)

P: Tiun ĉi diservon oni pretigis en Kanado. La vorto ‘Kanado’, en la lingvo de unu el la unuaj popoloj de la nacio, la *iroquois*,² signifas ‘vilaĝo’. Kiel membroj de la domo de Dio, la kristanoj tra la mondo fakte loĝas en ‘vilaĝo’. Kiam la kristanoj celebras, ili unuiĝas al tiu ĉi granda monda vilaĝo, plenplena je belaĵoj, luktoj kaj espero. Karaj geamikoj, ni bonvenigas vin por ke vi unuiĝu preĝe per la graco de nia Sinjoro Jesuo Kristo, de la amo de Dio kaj la komuneco de la Sankta Spirito.

K: Amen.

P: Dio de amo alvokas ĉiujn nin: de nia domoj kaj oficejoj, de niaj minejoj kaj fabrikoj, de niaj kampoj kaj negocejoj, de niaj boatoj de fiŝkaptado kaj niaj bredadoj, de niaj lernejoj kaj hospitaloj, de niaj prizonoj kaj punejoj, por ke ni estu unu en komuneco kun nia Sinjoro Jesuo Kristo.

K: Faru nin unu en Kristo.

P: La indiĝenaj popoloj de Kanado sekvas malnovan riton de preĝado, rigardante en malsamaj direktoj. Kun ili, ni unuiĝu en preĝado, turnante nian rigardon al ĉiu el la direktoj montrotaj.

Rigardante orienten

P: De la oriento, direkto laŭ kiu la suno eliras, ni ricevas pacon, lumon, saĝecon kaj konon.

K: Ni dankas al vi pro tiuj ĉi donacoj, ho Dio!

Rigardante suden

P: De la sudo venas la varmo, la instruo, la komenco kaj la fino de la vivo.

K: Ni dankas al vi pro tiuj ĉi donacoj, ho Dio!

Rigardante okcidenten

P: De la okcidento venas la pluvo, la purigaj akvoj kiuj subtenas la vivantajn estaĵojn.

K: Ni dankas al vi pro tiuj ĉi donacoj, ho Dio!

Rigardante norden

P: De la nordo venas la malvarmo, la impeta vento kaj la blanka neĝo, kiuj donas al ni forton kaj rezistemon.

K: Ni dankas al vi pro tiuj ĉi donacoj, ho Dio!

Turnante nin antaŭen kaj rigardante supren

P: De la ĉielo ni ricevas la mallumon, la lumon kaj la aeron de via respiro.

K: Ni dankas al vi pro tiuj ĉi donacoj, ho Dio!

Rigardante malsupren

P: De la tero ni venis kaj al la tero ni revenos.

Dum pli ol 150 jaroj, kelkaj kristanaj konfesioj de Kanado kunlaboris kun la federacia registaro por funkciigadi sistemon de t.n. „Indian Residential Schools“ (t.e. porindianaj internulejoj), en kiuj indiĝenaj infanoj, ofte kontraŭ la volo de iliaj gepatroj, estis edukitaj kaj asimilitaj al la eŭropeca kulturo. Tiuj lernejoj, kiuj estis destinitaj por ekstermi la indiĝenajn lingvon kaj kulturon, ofte estis lokoj de fizika, emocia kaj seksa misuzado. La plej grandaj eklezioj en Kanado - la romkatolika, United, la anglikana kaj la presbiteriana – kunkulpis pri tio kaj pasinttempe pardonpetis diversmaniere. Ĉi tiuj eklezioj nun proksime kunlaboras kun indiĝenoj, serĉante justecon, penton, verecon kaj repaciĝon. De plej mallonge, tio okazas per la nacia „Truth and Reconciliation Commission“⁵ (t.e. komisio pri vereco kaj repacigo), kiu estas parto de entute ĉioninkluziva respondo al la heredaĵo de tiuj ĉi internulejoj.

Ekde la unuaj ĉeffrontaj spertoj la kanadaj eklezioj ekevoluis instinkton pri kunlaborado pri animzorgado. Jam en la 1880-aj jaroj presbiterianaj, metodistaj kaj kongrecionalistaj misiistoj kunlaboris kun dividitaj respondecoj pri misiado en okcidenta Kanado. El tio rezultis unuigitaj eklezioj, kiuj estis parto de la instigo al fondiĝo de „United Church of Canada“ (t.e. Unuiĝinta Eklezio de Kanado) en 1925, kiu estis la unua moderna ekumena eklezia unuiĝo en la mondo. Pledantoj pri tiu ĉi unuiĝo rigardis ĝin kiel rimedon provizi unuiĝintan kristanaran estrecon en la efektivigo de la fondado de la nacio.

Nuntempe la kunlaboro en la poreklezia laboro aperas en multaj aliaj formoj. Spirita animzorgado en malliberejoj, universitatoj, malsanulejoj kaj la armeo estas kundividita inter ekumenaj kape-lanejoj. La pliparto de la teologia edukado enlanda okazas en ekumenaj konsorciaj lernejoj. Aliaj formoj de kunlaboro evoluiĝis en porkomunumaj laborkampoj, ekz. „Ecumenical Shared Ministries“ (t.e. ekumenaj kundividitaj animzorgaj servoj), en kiuj

kunlaboris kun protestantoj. Sed bedaŭrinde la unua periodo de kunlaboro cedis lokon al diskriminacio kaj poste nur katolikoj povis iĝi setlistoj de Nova Francio. La origina nomo de Montreal „Ville Marie“ respegulis ĉi tiujn katolikajn fundamentojn.

Meze de la 18-a jarcento Nova Francio estis transdonita al Granda Britio kaj katolikaj franc-kanadaj familioj iĝis subuloj de la anglikana reĝo de Anglio. Kiam Britio ankoraŭ havis leĝojn kontraŭ katolikoj, religia libereco estis donita al Kanado fare de la leĝo kune kun lingvaj, edukaj kaj kulturaj liberecoj. Sed en ĉi tiu reĝimo alternis periodoj de toleremo kaj malfacilaĵoj.

Ĝis la 1950-aj jaroj katolikaj episkopoj estris la plimulton de la institucioj en la francaj komunumoj. Dume, la lando kreskis kaj akceptis ondojn da enmigrantoj dum ĝiaj sukcesaj jaroj. Anglaj, skotaj kaj irlandaj enmigrantoj ekalvenis fine de la 18-a jarcento. Pli poste, en la 19-a jarcento al la ondoj de novalvenantoj aldoniĝis multaj latinamerikanoj, afrikanoj, mezorientanoj kaj azianoj. Dum la 20-a jarcento homoj el ĉiuj partoj de la mondo venis al Kanado kiel enmigrantoj kaj fuĝintoj, inkluzive rimarkinda nombro de okcident-kaj orient-ortodoksuloj el Orienta Eŭropo kaj Mezoriento. Ties kristanaj tradicioj pliriĉigis la kanadan kristanaron. Nuntempe la kristanoj en Kanado diservas per centoj da lingvoj kaj dialektoj, konservante elementojn el la diversaj kulturoj en riĉa kultura kaj religia mozaiko. Ankaŭ membroj de aliaj religioj ekloĝis en Kanado, inkluzive de judoj, islamanoj, sikhoj, hinduoj kaj bahaanoj. Kanadaj urboj apartenas al la plej multkulturaj kaj multreligiaj en la mondo. Iamaj registaraj programoj, kiuj postulis asimiladon, estis anstataŭigitaj per oficiala multkulturismo ekde la 1970-aj jaroj. La lando pliriĉigis pro la kontribuo de civitanoj de diversa deveno kaj ni ĝojas pri ilia videbla ĉeesto en politikaj, edukaj, kuracistaj, artaj, komunikadaj, negocaj kaj religiaj agadkampoj.

K: Ni dankas al vi, ho Dio, pro via bonkora kreaĵaro, nia surtera domo!

P: Ke ni povu, ho bona Dio, iri laŭ bonaj vojoj, vivante sur tiu ĉi tero fratece, ĝuante la benojn de la aliaj kaj farante nia ilian doloron, unuece kun vi, je la nomo de Jesuo, kaj kun la viviganta blovo de la Spirito kiu renovigas la teron!

K: Amen.

Laŭd-Himno

Pento-preĝo

P: Movitaj de la admono de Paŭlo al la korintanoj, ni konfesu niajn pekojn:

P: Dio kompatema, per Jesuo Kristo vi riĉigis nin abunde je ĉiaj donacoj, koncernaj kaj al la kono kaj al la parol-kapablo. En nia orgojlo, ni atribuas tiujn ĉi donacojn al ni mem, sen rekoni ilian veran fonton. Sinjoro, kompatu nin!

K: Sinjoro, kompatu nin! aŭ Kyrie eleison (oni povas kanti)

P: Dio kompatema, en Kristo ne mankas ia ajn donaco al ni. Tamen, ofte ni estas tro timemaj aŭ estas tro zorgemaj pri ni mem kaj tial ni ne dividas la mirindaĵojn de tiu ĉi vivo-mesaĝo inter la aliaj homoj. Sinjoro, kompatu nin!

K: Sinjoro, kompatu nin!

P: Dio kompatema, vi alvokas nin al la konkordo en via Filo Jesuo Kristo. Pro nia manko je entuziasmo por retrovi la harmonion pensi kaj senti la samon, pro nia emo permesi tro facile la restadon de dividoj kaj kvereloj inter ni. Sinjoro, kompatu nin!

K: Sinjoro, kompatu nin!

P: Dio kompatema, vi plenumas vian vorton kvankam vi vidas nian malfortecon. Pardonu niajn pekojn de intereso-manko kaj nia pigra

akceptado al la dividoj inter ni. Per la graco de via Spirito, lumigu denove nian volon paŝi konkrete por konservi nian aliancon de unueco al vi, al la aliaj kaj al la tuta kreaĵaro.

K: Amen.

2. Ni aŭskultas la Vorton de Dio

Legajoj el la Biblio:

Unua legajo: Jes 57, 14-19

Kaj Li diras: Faru vojon, faru vojon, ebenigu irejon, forigu malhelpojn de la vojo de Mia popolo. Ĉar tiele diras la Plejalta kaj Plejsupra, kiu restas eterne kaj kies nomo estas Sanktulo: Alte kaj en sankta loko Mi loĝas, sed ankaŭ apud afliktito kaj humilulo, por revigligi la spiriton de humiluloj kaj revivigi la koron de afliktitoj. Ĉar ne eterne Mi malpacas kaj ne senfine Mi koleras; alie tute senfortiĝus antaŭ Mi la spirito kaj la animoj, kiujn Mi kreis. Pro la peko de lia avideco Mi koleras kaj frapis lin, Mi deturnis Min kaj koleras; sed li iris perfide, iris laŭ la vojo de sia koro. Mi vidis liajn vojojn, kaj Mi lin sanigos; Mi kondukos lin kaj redonos konsolon al li kaj al liaj plorantoj. Mi kreos diron de la buŝo: Paco, paco al malproksimaj kaj al proksimaj, diras la Eternulo; kaj Mi sanigos lin.

Psalmo 36, 5-10

Krimon li pripensas sur sia kuŝejo;
Li staras sur vojo ne bona;
Malbonon li ne abomenas.

Ho Eternulo, ĝis la ĉielo atingas Via boneco,
Via vereco ĝis la nuboj.
Via justeco estas kiel la montoj de Dio,
Viaj juĝoj estas granda abismo;
Homon kaj bruton Vi helpas, ho Eternulo.

EKUMENISMO EN KANADO³

Inter multaj faktoroj, kiuj influas la kanadan religian sperton, estas la grandeco de la lando. Kanado estas la dua plej granda lando en la mondo, 40 % de la lando estas en Arktiko norde de la 60-a latitudo. Kanado etendiĝas de Atlantiko al Pacifiko kaj de Usono al Norda Poluso. Ĝi havas dek provincojn kaj tri teritoriojn. Ni estas ĉirkaŭitaj per tri oceanoj: Atlantika, Pacifika kaj Arktika. Nia ununura landa limo estas kun Usono kaj ni spertis preskaŭ 200 jarojn de paco. Kanado estas konfederacio de eksaj britaj kolonioj kun parlamenta formo de regado en la federacia sistemo de dek provincoj kaj tri teritorioj. La unuiĝo de eksaj koloniaj teritorioj kaj sendependeco de Britio okazis paceme kaj Kanado restas forta subtenanto de internacia agado kaj kunlaboro. La vastaj distancoj inter niaj urboj subtenis memstarecon kaj formiĝon de diversaj identecoj en la regionoj, sed ili ankaŭ povas elvoki sentojn de fremdiĝo aŭ ĉagreniĝo.

Kanado estas konata pro sia natura beleco: montaroj, arbaroj, lagoj kaj riveroj, maroj de tritiko kaj tri oceanaj bordoj. Ĝi estas lando riĉa je agrikulturo kaj naturaj rimedoj. Kanado estas ankaŭ lando de diversaj gentoj: la „First Nation”⁴ (unua gento⁴) Inuitoj kaj Metis kaj multaj homoj el la tuta mondo, kiuj setliĝis ĉi tie. Ni havas du oficialajn lingvojn, la francan kaj la anglan, sed multaj kanadanoj ankaŭ festas kulturen kaj lingvan heredaĵon de la hejmlandoj de siaj antaŭuloj.

Jacques Cartier, la unua franca navigisto, kiu navigis laŭlonge de rivero de Sankta Laŭrenco, estis la unua eŭropano, kiu aŭdis indiĝenojn uzi vorton “Kanada”, kio signifas “vilaĝo.” La unuaj setlistoj el Francio estis ĉefe romkatolikoj, sed tie estis ankaŭ kelkaj protestantoj, ĉefe hugenotaj komercistoj. La religiaj streĉitecoj en Francio ne estis sentitaj en Nova Francio, ĉar jezuitoj volonte

ĝin al la subulo, li sidiĝis; kaj la okuloj de ĉiuj en la sinagogo atente lin rigardis. Kaj li ekparolis al ili: Hodiaŭ tiu skribo plenumiĝas en viaj oreloj.

Tri sugestoj por pripenso

Kune ni nove proklamas la bonan novaĵon jam profetitan de Jesaja, plenumitan en Jesuo Nia Sinjoro, predikitan de Paŭlo la apostolo kaj ricevitan de la Eklezio. Alfrontante honeste la malsamecojn kiujn ni havas kaj la etiketojn de ĉiu nomgrupo, neniam ni pretervidu la komunan ordonon kiujn ni ĉiuj ricevis: proklami la evangelion de Jesuo Kristo.

Paŭlo estis sendata proklami la evangelion sen fanfaron de homa elokvento, por ke ne estu nuligita la efiko de la Kruco de Kristo (1 Kor 1, 17). La vojo al la unueco troviĝas en la povo de la kruco.

La Evangelio kiun ni proklamas fariĝas tuŝebla kaj elstara por ni kiam ni estas atestantoj de la faroj de Jesuo Kristo en niaj propraj vivoj kaj en la vivo de la komunumoj.

Demandoj por la persona pripenso

Kiel la Evangelio kiun vi ricevis estas ligata kun ĝia transdono kultura aŭ historia?

Ĉu tio estis obstaklo por la unueco?

Kiel povus pli granda unueco en Kristo fari el ni pli bonaj atestantoj de la Evangelio kiun ni ricevis?

Preĝo

Kompatema Dio, Vi sendis vian Filon al ni en la povo de la Sankta Spirito por elaĉeti vian popolon. Unuigu nin el nia diverseco por ke ni povu jesi kaj proklami kune la bonan novaĵon de la vivo, morto kaj resurekto de Kristo, por mondo, kiu bezonas lian evangelion. Amen.

Kiel grandvalora estas Via favoro, ho Dio!
Kaj la homidoj ricevas rifuĝon en la ombro de Viaj flugiloj.
Ili satiĝas per la riĉa havo de Via domo,

Kaj el la rivero de Viaj bonaĵoj Vi ilin trinkigas.
Ĉar ĉe Vi estas la fonto de vivo,
Kaj en Via lumo ni vidas lumon.

Dua legaĵo: 1 Kor 1, 1-17

Paŭlo, vokita por esti apostolo de Jesuo Kristo per la volo de Dio, kaj Sostenes, nia frato, al tiu eklezio de Dio, kiu estas en Korinto, al tiuj, kiuj estas sanktigataj en Kristo Jesuo, vokitaj por esti sanktuloj, kune kun ĉiuj, kiuj en ĉiu loko vokas la nomon de nia Sinjoro Jesuo Kristo, ilia Sinjoro kaj nia: Graco estu al vi kaj paco de Dio, nia Patro, kaj de la Sinjoro Jesuo Kristo. Mi ĉiam dankas mian Dion pri vi, pro la graco de Dio al vi donita en Kristo Jesuo; ke en ĉio vi riĉiĝis en li, en ĉia parolo kaj ĉia scio; kiel ankaŭ la atesto de Kristo konfirmiĝis en vi; tiel, ke vi malatingas nenian donacon; atendente la malkaŝon de nia Sinjoro Jesuo Kristo, kiu ankaŭ konfirmos vin ĝis la fino, por ke vi estu neriproĉeblaj en la tago de nia Sinjoro Jesuo Kristo. Fidela estas Dio, per kiu vi estas alvokitaj en la kunulecon de Lia Filo Jesuo Kristo, nia Sinjoro. Mi petegas vin, fratoj, per la nomo de nia Sinjoro Jesuo Kristo, ke vi ĉiuj parolu tion saman, kaj ke estu neniam skismoj inter vi; sed ke vi estu perfekte kunigitaj en la sama spirito kaj en la sama juĝo. Ĉar pri vi, miaj fratoj, estas sciigite al mi de la domanoj de Ĥloe, ke ekzistas inter vi malpacoj. Kaj la jenon mi volas diri, ke ĉiu el vi diras: Mi estas de Paŭlo; kaj mi de Apolos; kaj mi de Kefas; kaj mi de Kristo. Ĉu Kristo estas dividita? ĉu Paŭlo krucumiĝis por vi? aŭ ĉu vi baptiĝis en la nomon de Paŭlo? Mi dankas Dion, ke mi baptis neniun el vi krom Krispo kaj Gajo; por ke neniun diru, ke vi baptiĝis en mian nomon. Kaj mi baptis ankaŭ la familion de Stefanaso; krom tio mi ne scias, ĉu mi baptis iun alian. Ĉar Kristo sendis min, ne por bapti, sed por prediki la evangelion; ne en saĝeco de vortoj, por ke la kruco de Kristo ne vantiĝu.

Evangelio: Mar 9, 33-41

Kaj ili venis al Kapernaum, kaj kiam li estis en la domo, li demandis ilin: Pri kio vi diskutis sur la vojo? Sed ili silentis; ĉar ili diskutis inter si sur la vojo pri tio, kiu estas la plej granda. Kaj sidiĝinte, li alvokis la dek du, kaj diris al ili: Se iu volas esti unua, li estos lasta el ĉiuj, kaj servanto de ĉiuj. Kaj preninte infanon, li starigis ĝin meze de ili; kaj ĉirkaŭbrakinte ĝin, li diris al ili: Kiu akceptos unu el tiaj infanoj en mia nomo, tiu akceptas min; kaj kiu akceptas min, tiu akceptas ne min, sed Tiun, kiu sendis min.

Johano diris al li: Majstro, ni vidis iun elpelantan demonojn en via nomo; kaj ni malpermesis lin, ĉar li ne sekvas nin. Sed Jesuo diris: Ne malpermesu lin; ĉar neniuj, kiu faros miraklon en mia nomo, povos facile paroli malbone pri mi. Ĉar tiu, kiu ne estas kontraŭ ni, estas por ni. Ĉar kiu donos al vi trinki tason da akvo, pro tio, ke vi apartenas al Kristo, vere mi diras al vi, tiu neniel perdos sian rekompencan.

Homilio

3. Ni respondas krede en unueco

Kredo-konfeso

**K. Mi kredas je Dio, la Patro ĉiopova,
la kreinto de la ĉielo kaj de la tero;**

kaj je Jesuo Kristo,

Lia unu-nura Filo, nia Sinjoro,

koncipita per la Sankta Spirito,

naskita el Maria la Virgulino,

suferinta sub Poncio Pilato,

krucumita, mortinta kaj entombigita,

sobirinta en la regnon de la morto.

La trian tagon Li releviĝis el la mortintoj,

supren-iris al la ĉielo,

Kaj Vian grandecon mi rakontos.

Oni gloros la renomon de Via granda boneco,

Kaj oni prikantos Vian justecon.

Dua legaĵo: 1 Kor 15, 1-8

Mi transdonis al vi tion, kion mi ankaŭ ricevis

Kaj mi sciigas vin, fratoj, pri la evangelio, kiun mi predikis al vi, kiun ankaŭ vi ricevis, en kiu ankaŭ vi staras, per kiu vi saviĝis; se vi en memoro tenas, per kiuj vortoj mi ĝin predikis al vi, krom se vi kredis vane. 3 Ĉar mi transdonis al vi komence tion, kion mi ankaŭ ricevis, ke

Kristo mortis

pro niaj pekoj

laŭ la Skriboj;

kaj ke li estis entombigita;

kaj ke li aperis al Kefas;

poste al la dek du; poste li aperis al pli ol kvincent fratoj samtempe,

el kiuj la plimulto restas ĝis nun, sed kelkaj jam ekdormis; poste li

aperis al Jakobo; poste al ĉiuj apostoloj; kaj fine li aperis al mi

ankaŭ, kiel al infano ekstertempe naskita.

Evangelio: Luk 4, 14-21

Hodiaŭ tiu skribo plenumiĝas en viaj oreloj

Kaj revenis Jesuo en la potenco de la Spirito en Galileon; kaj eliris famo pri li tra la tuta ĉirkaŭaĵo. Kaj li instruadis en iliaj sinagogoj, glorate de ĉiuj. Kaj li venis al Nazaret, kie li estis edukita; kaj laŭ sia kutimo li eniris en la sinagogon en la sabata tago, kaj stariĝis, por legi. Kaj estis donita al li libro de la profeto Jesaja. Kaj, malferminte la libron, li trovis la lokon, kie estis skribite: La spirito de la Eternulo estas sur mi, Ĉar Li min sanktoleis, por bonanonci al malriĉuloj; Li sendis min, por anonci liberecon al kaptitoj Kaj vidpovon al blinduloj, Por meti la vunditojn en liberecon, Por proklami favorjaron de la Eternulo. Kaj kunvolvinte la libron, kaj redoninte

**LA OKA TAGO:
Kune... ni proklamu la evangelion**

Legajoj

Unua legaĵo: Jes 61, 1-4

Dio, la Sinjoro, [...] min elektis por bonanongi

La spirito de la Sinjoro, la Eternulo, estas sur mi, ĉar la Eternulo min sanktoleis, por bonanongi al mizeruloj; Li sendis min, por bandaĝi tiujn, kies koro estas vundita, por anonci liberecon al kaptitoj kaj malŝlosan al malliberigitaj, por proklami favorjaran de la Eternulo kaj venĝotagon de nia Dio, por konsoli ĉiujn malĝojulojn, por fari al la afliktitoj de Cion, ke oni donu al ili ornamon anstataŭ cindro, oleon de ĝojo anstataŭ funebro, veston de gloro anstataŭ spirito afliktita, kaj ke oni nomu ilin kverkoj de justeco, plantaĵo de la Eternulo por Lia gloro. Kaj ili rekonstruos la antikvajn ruinojn, restarigos la detruitajn de la antaŭa tempo, kaj renovigos la ruinigitajn urbojn, dezertigitajn antaŭ multe da generacioj.

Psalmo: 145, 1-7

Generacio al generacio laŭdos Viajn farojn

Mi altigos Vin, mia Dio, ho Reĝo,
Kaj mi benos Vian nomon ĉiam kaj eterne.
Ĉiutage mi benos,
Kaj mi gloros Vian nomon ĉiam kaj eterne.
Granda estas la Eternulo kaj tre glorinda,
Kaj Lia grandeco estas nemezurebla.
Generacio al generacio laŭdos Viajn farojn
Kaj rakontos pri Via potenco.
Pri la majesto de Via granda gloro
Kaj pri Viaj mirindaj faroj mi meditos.
La forton de Viaj timindaĵoj oni priparolos,

**sidas dekstre de Dio, la Patro ĉiopova,
de kie Li venos, por juĝi la vivantojn
kaj la mortintojn.**

**Mi kredas je la Sankta Spirito,
la sankta katolika eklezio,
la komuno de la sanktuloj,
la pardono de la pekoj,
la releviĝo de la mortintoj,
kaj la vivo eterna.
Amen.**

Ekumena interŝanĝo de spiritaj donacoj

La pretigintoj de la diservo kunvenis antaŭ kelka tempo por pripensi la diversajn donacojn de la Eklezioj en la komunumo. Oni povas elekti lokajn donacojn aŭ la donacojn de pli ampleksa tradicio. Rerezentantoj de la diversaj Eklezioj portas objektojn, kiuj estas simboloj de tiuj donacoj kiujn la koncernaj tradicioj alportas al la tuta kristana komunumo. La donacoj estu portitaj kaj metitaj sur tablon. Leganto povas anonci la donacojn per tiuj vortoj aŭ aliaj similaj vortoj:

De la Eklezio ni ricevas dankeme la donacon de la reprezentita ĉi tie de

K: Ni dankas al vi pro tiuj ĉi donacoj, ho Sinjoro!

Kolekt-preĝo:

Sinjoro Jesuo Kristo, vi diris al la apostoloj “Pacon mi lasas al vi, mian pacon mi donas al vi”. Ne atentu niajn pekojn, sed la fidelecon de via Eklezio, kaj degnu laŭ via volo doni al ni la pacon kaj la unuecon de la ĉiela civito, kie vi kun la Patro kaj la Sankta Spirito vivas kaj regas eterne. Amen.

Intercedaj preĝoj

Kune, la Eklezioj de Kanado prenis al si la “Ok Celojn de la Jarmilo de la Unuiĝintaj Nacioj. La jenaj preĝoj altigas tiujn celojn.

P: Ni preĝas por ĉiuj homoj kiuj suferas ĉiutage la *malriĉecon kaj la malsatecon*. Ilia malfacila situacio ofte provokas dividojn; ke la amo de Kristo restarigu la justecon kaj la pacon. Dio kompatema, aŭskultu nian preĝon!

K: Kaj, en via amo, respondu al ni.

P: Ni preĝas por ĉiuj luktantoj *por universala instruado*. Ke ilia soifo je kono konstruu pontojn inter niaj Eklezioj kaj restarigu la respekton inter niaj diferencoj. Dio kompatema, aŭskultu nian preĝon!

K: Kaj, en via amo, respondu al ni.

P: Ni preĝas por ĉiuj luktantoj por egaleco inter viroj kaj virinoj en digneco kaj rajtoj. Ni speciale havas en la menso la bezonon de egaleca aliro al laboro, varoj kaj servoj. Ke ni, unuiĝintaj en Kristo Jesuo, *sukcesu ricevi la donacojn kaj de viroj kaj de virinoj*. Dio kompatema, aŭskultu nian preĝon!

K: Kaj, en via amo, respondu al ni.

P: Ni preĝas por la gejunuloj kiuj malsanas kaj tiuj kiuj luktas por plibonigi la *sano-kondiĉon de la infanoj*. Ke ni, respondeciĝintaj pri la infanoj, sukcesu akcepti Kriston mem. Dio kompatema, aŭskultu nian preĝon!

K: Kaj, en via amo, respondu al ni.

P: Ni preĝas por la gravedaj virinoj kaj por ilia *patrina sano*. Ke ni povu respondeciĝi pri tiuj virinoj, kiuj alportas novan vivon kaj kies amo al siaj gefiloj memorigas nin pri la unuiga amo de Dio al ni. Dio kompatema, aŭskultu nian preĝon!

K: Kaj, en via amo, respondu al ni.

P: Ni preĝas por tiuj kiuj malsanis de la *Aidoso, la malario kaj aliaj malsanoj*. Ke ni povu aŭskulti la voĉojn de tiuj, al kiuj oni neas dignan vivon kaj laboron, kaj ni konstruu mondon, kie ĉiuj popoloj estu respektataj kaj zorgataj, kie neniu estu ekskludata. Dio kompatema, aŭskultu nian preĝon!

K: Kaj, en via amo, respondu al ni.

Ni estas benitaj pri donacoj de Dio – diversaj ekleziaj tradicioj. Rekonado de tiuj donacoj unu en la aliaj instigas nin krei videblan union.

Nia bapto unuigas nin en unu Korpo de Kristo. Dum ni alte taksas niajn disigitajn ekleziojn, Sankta Paŭlo memorigas: ĉiuj, kiuj vokas Nomon de Dio, estas kun ni en Kristo ĉar ni ĉiuj apartenas al unu Korpo. Kaj restos neniu, al kiu ni povos diri: "mi vin ne bezonas" (1 Kor 12,21).

Demandoj por la persona pripenso

Kiuj estas signoj de "apartenado al Kristo"?

Kiamaniere la frazon "Mi apartenas al Kristo" oni povas uzi por disdividi la kristanojn, sed ne por unuigi ilin?

Preĝo

Ni dankas Vin, ho Sinjoro, ĉar Vi benas ĉiun membron de Krista Korpo pri donacoj de Via Spirito. Helpu al ni subteni unu la alian, estimi diferencojn inter ni, kaj labori por unueco de ĉiuj en la mondo, kiuj vokas Jesuon kiel Sinjoron. Amen.

la tuta korpo estus okulo, kie estus la aŭdado? Se la tuta korpo estus aŭdado, kie estus la flarado? Sed Dio jam metis la membrojn al la korpo, ĉiun, kiel al Li plaĉis. Kaj se ĉiuj estus unu membro, kie estus la korpo?

Nun do ekzistas multaj membroj, sed unu korpo. Kaj la okulo ne povas diri al la mano: Mi vin ne bezonas; nek same la kapo al la piedoj: Mi vin ne bezonas. Sed multe plie la ŝajne malfortaj membroj de la korpo estas necesaj; kaj al tiuj partoj de la korpo, kiujn ni opinias malpli honorindaj, ni donas pli abundan honoron; kaj niaj negraciaj partoj havas pli abundan gracion; sed niaj graciaj partoj ne havas bezonon; tamen Dio kunakordigis la korpon, doninte pli abundan honoron al la parto, kiu havas mankon, por ke ne estu skismo en la korpo; sed ke la membroj prizorgu egale unu la alian.

Kaj se unu membro suferas, ĉiuj membroj kune suferas; aŭ se unu membro honorigâs, ĉiuj membroj kunĝojas.

Evangelio: Mar 9, 38-41

Tiu, kiu ne estas kontraŭ ni, estas por ni

Johano diris al li: Majstro, ni vidis iun elpelantan demonojn en via nomo; kaj ni malpermesis lin, ĉar li ne sekvas nin. Sed Jesuo diris: Ne malpermesu lin; ĉar neniu, kiu faros miraklon en mia nomo, povos facile paroli malbone pri mi. Ĉar tiu, kiu ne estas kontraŭ ni, estas por ni. Ĉar kiu donos al vi trinki tason da akvo, pro tio, ke vi apartenas al Kristo, vere mi diras al vi, tiu neniel perdos sian rekompencan.

Tri sugestoj por pripenso

Jesaja profetis la tagon, kiam egiptanoj kaj asirianoj kune kun Israelo adoros la Sinjoron kiel Dia popolo. Kristana komunumo estas Dia projekto de la homa komunumo ĝenerale. Ni preĝas por ke venu la tago, kiam ni ĉiuj kune adoros la Sinjoron en unu kredo kaj unu Eŭkaristio.

P: Ni preĝas por tiuj, kiuj suferas la konsekvencon de malbona zorgado al la kreaĵaro kaj por ĉiuj specioj en danĝero. Konduku nin al *ekologia disvolviĝo* por ke ni povu repaciĝi al la kreaĵaro. Dio kompatema, aŭskultu nian preĝon!

K: Kaj, en via amo, respondu al ni.

P: Ni preĝas por tiuj, kiuj *praktikas la internacian solidarecon* kaj akcelas mondan unuiĝon. Ke ni, favorante al justa komercado de varoj kaj al nuligo de ŝuldoj de malriĉaj landoj, povu ankaŭ lukti por la justeco. Dio kompatema, aŭskultu nian preĝon!

K: Kaj, en via amo, respondu al ni.

P: Dum ni klopodas atingi tiujn celojn, ke ni povu malkovri vian voĉon, ho Sinjoro, kaj vojiri kune al la Regno pri kiu vi mem preĝis. Pro tio, ni preĝas:

Preĝo de la Sinjoro (*preĝe aŭ kante*)

**Patro nia, kiu estas en la ĉielo,
sanktigata estu via nomo.**

Venu via regno.

Fariĝu via volo,

kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero.

Nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ.

Kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn,

kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj.

**Kaj ne konduku nin en tenton,
sed liberigu nin de la malbono.**

Ĉar Via estas la regno,

kaj la potenco

kaj la gloro.

Amen.

Paco-signo

P: Kiam la francoj atingis Kanadon en la jarcentoj 16-a kaj 17-a, tiam ili trovis landon riĉan je naturaj riĉfontoj kaj ilin helpis la Unuaj Popoloj. Ilia dankemo faris, ke la ŝipo kiu alportis la fondinton de la urbo Kebeko estu baptita je la nomo “*Don de Dieu*”, kiu signifas “Donaco de Dio”.

En multaj el la eŭkaristiaj ritoj utiligataj en Kanado, oni invitas la homojn al la komunio per la vortoj “la donacoj de Dio al la popolo de Dio”. La unueco por kiu ni preĝas estas la refaro de la plena komuneco inter ni, kies signo estos la kuna ricevo de la eŭkaristiaj donacoj. Tamen, ankaŭ en la vojo al videbla unueco ni interŝanĝas inter ni aliajn donacojn, kiuj estas donacoj de Dio al la popolo de Dio.

Nuntempe, en la franclingva provinco de Kebeko, la esprimo "don de Dieu" – donaco de Dio – havas novan vivecon en la kristana komunumo kaj en la popola kulturo. Ĝi memorigas senton de dankemo pro la donacoj de Dio, sento kiu venas de tiam, kiam la antaŭuloj estis kapablaj partigi la dankesprimon al la Unuaj Popoloj de Kanado.

Kiel paco-signo kaj maniero rekoni la donacojn kiujn ni ricevas de la aliaj, ni diru unuj al la aliaj tiel, kiel la franclingvaj kanadanoj: “Don de Dieu”.

Ĉiuj salutas unu la aliajn per brakumo, per kapoinklino aŭ per manpremo, dum ili diras:

K: “Don de Dieu”

Himno de oferdonado (*oni povas fari kolekton dum la himno*)

Jen, ho Eternulo, Vi ĉion jam scias.
De malantaŭe kaj de antaŭe Vi ĉirkaŭbaris min
Kaj metis sur min Vian manon.
Mirinda estas por mi tia sciado, tro alta;
Mi ĝin ne povas kompreni.

Kien mi iros for de Via spirito?
Kaj kien mi kuros for de Via vizaĝo?
Se mi levigos al la ĉielo, Vi estas tie;
Se mi kuŝigos en Ŝeol, jen Vi tie estas.
Ĉu mi okupos la flugilojn de la matenruĝo,
Ĉu mi loĝigos sur la rando de la maro:
Ankaŭ tie Via mano min kondukos,
Kaj Via dekstra mano min tenos.
Se mi diros: Mallumo min kovros,
Kaj la lumo ĉirkaŭ mi fariĝos nokto:
Eĉ mallumo ne mallumas antaŭ Vi,
Kaj la nokto lumas kiel tago;
Mallumo fariĝas kiel lumo.

Dua legaĵo: 1 Kor 12, 12-26

Se unu membro suferas, ĉiuj membroj kune suferas, [...] se unu membro honorigas, ĉiuj membroj kunĝojas

Ĉar kiel la korpo estas unu, kaj havas multajn membrojn, kaj ĉiuj membroj de la korpo, estante multaj, estas unu korpo; tiel same ankaŭ estas Kristo. Ĉar en unu Spirito ni ĉiuj baptiĝis en unu korpon, ĉu Judoj aŭ Grekoj, ĉu sklavoj aŭ liberaj; kaj ĉiuj estas trinkiĝitaj el unu Spirito. Ĉar la korpo estas ne unu membro, sed multaj. Se la piedo diros: Pro tio, ke mi ne estas la mano, mi ne apartenas al la korpo – ne sekvas de tio, ke ĝi ne apartenas al la korpo. Kaj se la orelo diros: Pro tio, ke mi ne estas la okulo, mi ne apartenas al la korpo – ne sekvas de tio, ke ĝi ne apartenas al la korpo. Se

**LA SEPA TAGO:
Kune... ni apartenas al Kristo**

Legaĵoj

Unua legaĵo: Jes 19, 19-25

Li sendos al ili savanton, kiu savos ilin

En tiu tempo estos altaro por la Eternulo meze de la lando Egipta, kaj monumento por la Eternulo apud ĝia limo; kaj ĝi estos signo kaj atesto pri la Eternulo Cebaot en la lando Egipta; ĉar ili krios al la Eternulo pro la premantoj, kaj Li sendos al ili savanton kaj potenculon, kiu savos ilin. Kaj la Eternulo fariĝos konata al la Egiptoj; kaj la Egiptoj tiam ekkonos la Eternulon, kaj alportos buĉoferojn kaj farunferojn, kaj faros sanktajn promesojn al la Eternulo kaj plenumos. La Eternulo frapos la Egiptojn, frapos kaj resanigos; kaj ili returnos sin al la Eternulo, kaj Li aŭskultos ilian peton kaj resanigos ilin. En tiu tempo estos vojo de Egiptujo al Asirio; kaj la Asirianoj venados en Egiptujon kaj la Egiptoj en Asirion, kaj la Egiptoj servados kune kun la Asirianoj. En tiu tempo Izrael estos triope kun Egiptujo kaj Asirio; estos beno sur la tero. La Eternulo Cebaot benos ilin, dirante: Benataj estu Mia popolo la Egiptoj, kaj Asirio, verko de Miaj manoj, kaj Mia heredaĵo Izrael.

Psalmo: 139, 1-12

Kien mi iros for de Via spirito?

Ho Eternulo, Vi min esploras kaj min konas.
Vi scias, kiam mi sidas kaj kiam mi leviĝas;
Vi komprenas mian penson de malproksime.
Kiam mi iras kaj kiam mi ripozas, Vi estas ĉirkaŭ mi,
Kaj ĉiujn miajn vojojn Vi konas.
Ĉar antaŭ ol troviĝas vorto sur mia lango,

4. Ni eliras al la mondo

Respondeciĝo por la unueco

P: Paŭlo defiadis la kristanojn de Korinto, ke ili konu en sia koro kaj montru en siaj agoj, ke Kristo ne estas dividita. Li defias ankaŭ nin realigi pli plene la unuecon, kiun ni jam havas en Kristo.

Kune kun ĉiuj, kiuj ie ajn vokas la nomon de Jesuo Kristo, ilia kaj nia Sinjoro,

K: Kune, ni estas alvokitaj esti sanktaj.

P: Ricevinte donacojn de Dio ĉiumaniere,

K: Kune, ni dankas unuj pro la aliaj.

P: Riĉigite abunde je ĉiaj donacoj per nia unuiĝo al Kristo,

K: Kune, ne mankas al ni neniu spirita donaco.

P: Firmaj en Dio, kiu fortigas nin al amo kaj al servado,

K: Kune, ni konfesu, ke Dio plenumas sian vorton.

P: Brakumite de Jesuo Kristo,

K: Kune, ni estas alvokataj al konkordo.

P: Unuiĝinte en sama penso kaj sento,

K: Kune, ni serĉas la harmonion.

P: Superante niajn kverelojn pro tiu, kiu estis krucumita favore al ni,

K: Kune, ni apartenas al Kristo.

P: Ĉu estas vere, ke Kristo estas dividita?

K: Ne! Kune, ni eliras al la mondo por proklami lian bonan novaĵon!

Sendo-Himno

Beno kaj sendo

La benon povas doni pluraj el la diservantoj prezidantoj de la diservo, en la jena aŭ en alia taŭga formo.

P: La Sinjoro estu kun vi!

K: Kaj kun via spirito.

P: Ke la amo de la Sinjoro Jesuo konduku vin al li, ke la potenco de la Sinjoro Jesuo fortigu vin en la servado, ke la ĝojo de la Sinjoro Jesuo plenu vian spiriton, kaj la beno de Dio ĉiopova, Patro, Filo kaj Sankta Spirito, malsupreniru sur vin kaj restu poreterne!

K: Amen!

P: Vi povas iri en paco,
por ami kaj esti amata,
por akcepti kaj aparteni,
por servi kaj esti nutrata.

K: Al Dio estu danko!

Fina Himno

² prononcu " i-ru-kŭa' "

Dum ni strebas esti kuniĝintaj en la samaj pensoj kaj en la samaj konvinkiĝoj, ni estas vokataj serĉi la Sinjoron kaj Lian pacon, kiel skribas la psalmisto.

Demandoj por la persona pripenso

Ĉu vi memoras iun okazon, en kiu la profeteca laŭnoma vokado de dolorigaj disiĝoj de iu eklezio estis la komenco de renovigita sindevigo por pli granda unueco?

Kiuj demandoj ankoraŭ kaŭzas disiĝojn interne de la tutmonda kristanaro? Kiujn vojojn al pli granda unueco vi vidas?

Preĝo

Dio amema, Vi donas al ni profetajn atestantojn en tempoj de konfliktoj kaj malunuiĝo. Kiam ni Vin serĉas, ho Sinjoro, sendu vian Sanktan Spiriton, por ke ni iĝu konstruantoj de repaciĝo, unuiĝintaj en la samaj pensoj kaj en la samaj konvinkiĝoj. Per Kristo, nia Sinjoro, ni preĝas al Vi. Amen.

pri vi, miaj fratoj, estas sciigite al mi de la domanoj de Ĥloe, ke ekzistas inter vi malpacoj. Kaj la jenon mi volas diri, ke ĉiu el vi diras: Mi estas de Paŭlo; kaj mi de Apolos; kaj mi de Kefas; kaj mi de Kristo. Ĉu Kristo estas dividita? ĉu Paŭlo krucumiĝis por vi? aŭ ĉu vi baptiĝis en la nomon de Paŭlo? Mi dankas Dion, ke mi baptis neniun el vi krom Krispo kaj Gajo; por ke neniu diru, ke vi baptiĝis en mian nomon.

Evangelio: Luk 22, 24-30

Inter la disĉiploj fariĝis disputo

Kaj fariĝis ankaŭ inter ili disputo: kiun el ili oni opinias la plej granda. Kaj li diris al ili: La reĝoj de la nacioj faras sin sinjoroj super ili; kaj tiujn, kiuj potencas inter ili, oni nomas Bonfarantoj. Sed vi ne estas tiaj; sed kiu estas la pli granda el vi, tiu fariĝu kiel la pli juna; kaj tiu, kiu estas ĉefa, kiel la servanto. Ĉar kiu estas la pli granda, la sidanto ĉe manĝo, aŭ la servanto? ĉu ne la sidanto ĉe manĝo? sed mi estas meze de vi kiel la servanto. Sed vi estas tiuj, kiuj restadis apud mi en miaj tentoj; kaj mi difinas por vi regnon, kiel mia Patro difinis por mi; por ke vi manĝu kaj trinku ĉe mia tablo en mia regno, kaj sidu sur tronoj, juĝante la dek du tribojn de Izrael.

Tri sugestoj por pripensoj

La disiĝo priskribita en la unua letero de la apostolo Paolo al la Korintanoj (1, 12-13) evidencigas mislegadon de la evangelio, kiu de interne subfosas la integrecon de la mesaĝo de Kristo. Rekono de la konflikto kaj de la disiĝo, kiel faris la familianoj de Ĥloe, estas la unua paŝo por restarigi la unuecon.

Virinoj kiel Deborah kaj Ĥloe konsistigas profetecan voĉon en la Dia popolo dum la tempoj de konfliktoj kaj disiĝo, alfrontigante nin kun la bezono esti interpacigitaj. Ĉi tiuj profetecaj voĉoj povas igi la homojn kapablaj kuniĝi en renovigita unueco por agi kune.

LA UNUA TAGO: Kune... ni estas la popolo de Dio

Legajoj

Unua legaĵo: Eli 19, 3-8

Vi estos por Mi regno de pastroj kaj popolo sankta

Kaj Moseo supreniris al Dio; kaj la Eternulo vokis al li de la monto, dirante: Tiel diru al la domo de Jakob kaj sciigu al la filoj de Izrael: Vi vidis, kion Mi faris al la Egiptoj kaj kiel Mi portis vin sur aglaj flugiloj kaj venigis vin al Mi. Kaj nun se vi obeos Mian voĉon kaj observos Mian interligon, vi estos Mia amata propraĵo inter ĉiuj popoloj, ĉar al Mi apartenas la tuta tero. Kaj vi estos por Mi regno de pastroj kaj popolo sankta. Tio estas la vortoj, kiujn vi diru al la Izraelidoj. Moseo venis, kaj alvokis la ĉefojn de la popolo, kaj prezentis al ili ĉiujn tiujn vortojn, pri kiuj la Eternulo ordonis al li. Kaj la tuta popolo respondis kune kaj diris: Ĉion, kion la Eternulo diris, ni faros. Kaj Moseo raportis la vortojn de la popolo al la Eternulo.

Psalmo 95, 1-7

Ni estas la popolo de Lia paŝtejo kaj la ŝafoj de Lia mano

Venu, ni kantu al la Eternulo;
Ni ĝoje krii al la rifuĝejo de nia helpo.
Ni venu antaŭ Lian vizaĝon kun glorado,
Per psalmoj ni ĝoje krii al Li.

Ĉar granda Dio estas la Eternulo
Kaj granda Reĝo super ĉiuj dioj,
Kiu havas en Sia mano la profundaĵojn de la tero,
Kaj al kiu apartenas la altaĵoj de la montoj;
Al kiu apartenas la maro, kaj Li ĝin faris,
Kaj la sekteron Liaj manoj kreis.

Venu, ni kliniĝu, ni ĵetu nin teren,
Ni genuu antaŭ la Eternulo, nia Kreinto.
Ĉar Li estas nia Dio,
Kaj ni estas la popolo de Lia paŝtejo kaj la ŝafoj de Lia mano.

Dua legaĵo: 1 Pet 2, 9-10

Vi iam estis ne-popolo, sed nun estas popolo de Dio

Sed vi estas raso elektita, pastraro reĝa, nacio sankta, popolo Diposedata, por ke vi proklamu la gloron de Tiu, kiu vokis vin el mallumo en Sian lumon mirindan; kiuj iam estis ne-popolo, sed nun estas popolo de Dio; antaŭe nekompatitoj, sed nun kompatitoj.

Evangelio: Mat 12, 46-50

Kiu ajn faros la volon de mia Patro, kiu estas en la ĉielo, tiu estas mia frato kaj mia fratino kaj mia patrino

Dum li ankoraŭ parolis al la homamasoj, jen lia patrino kaj liaj fratinoj staris ekstere, dezirantaj paroli kun li. Kaj iu diris al li: Jen via patrino kaj viaj fratinoj staras ekstere, dezirantaj paroli kun vi. Sed li responde diris al tiu, kiu parolis al li: Kiu estas mia patrino? kaj kiuj estas miaj fratinoj? Kaj etendinte la manon al siaj disĉiploj, li diris: Jen mia patrino kaj miaj fratinoj! Ĉar kiu ajn faros la volon de mia Patro, kiu estas en la ĉielo, tiu estas mia frato kaj mia fratino kaj mia patrino.

Tri sugestoj por pripensoj

Ni kiuj alvokas la nomon de l' Sinjoro, ni estas vokataj kiel sanktuloj, ĉar ni estas sanktigitaj en Kristo Jesuo (1 Kor 1,2). En la libro Eliro tiu ĉi popolo kolektita de Dio estas priskribita kiel sia aparta propraĵo, kiel regno de pastroj kaj sankta popolo.

Laŭ la unua letero de Petro ni estas anoj de tiu komunumo de sanktuloj, ĉar Dio nin kunvokas al elektita familio, al reĝa pastreco, al

Per la Eternulo gloriĝas mia animo;
La humiluloj aŭdu kaj ĝoju.
Gloru la Eternulon kun mi,
Kaj ni altigu kune Lian nomon.
Mi serĉis la Eternulon, kaj Li respondis al mi,
Kaj de ĉiuj miaj danĝeroj Li savis min.
Kiuj rigardas al Li, ricevas lumon,
Kaj ilia vizaĝo ne kovriĝos per honto.
Jen ĉi tiu mizerulo vokis, kaj la Eternulo aŭdis,
Kaj de ĉiuj liaj mizeroj Li savis lin.
Anĝelo de la Eternulo postenas ĉirkaŭ tiuj, kiuj Lin timas,
Kaj Li ilin savas.
Provu kaj vidu, kiel bona estas la Eternulo;
Feliĉa estas la homo, kiu Lin fidas.
Timu la Eternulon, Liaj sanktuloj;
Ĉar nenio mankas al tiuj, kiuj Lin timas.
Leonidoj estas senhavaj kaj malsataj;
Sed kiuj serĉas la Eternulon, tiuj havas mankon en nenia bono.

Venu, infanoj, aŭskultu min;
Pri timo antaŭ la Eternulo mi vin instruos.
Kiu ajn vi estas, homo,
Kiu deziras vivon kaj amas multajn kaj bonajn tagojn:
Gardu vian langon kontraŭ malbono,
Kaj vian buŝon kontraŭ mensoga parolo;
Dekliniĝu de malbono kaj faru bonon,
Serĉu pacon kaj ĉasu ĝin.

Dua legaĵo: 1 Kor 1, 10-15

Vi estu perfekte kunigitaj en la sama spirito kaj en la sama juĝo

Mi petegas vin, fratinoj, per la nomo de nia Sinjoro Jesuo Kristo, ke vi ĉiuj parolu tion saman, kaj ke estu neniaj skismoj inter vi; sed ke vi estu perfekte kunigitaj en la sama spirito kaj en la sama juĝo. Ĉar

**LA SESA TAGO:
Kune... ni klopedu esti kunigitaj**

Legajoj

Unua legajo: Juĝ 4, 1-9

Se vi iros kun mi, mi iros

Kaj la Izraelidoj denove faris malbonon antaŭ la okuloj de la Eternulo, kiam Ehud mortis. Kaj la Eternulo transdonis ilin en la manojn de Jabin, Kanaana reĝo, kiu reĝis en Ĥacor; lia militistestro estis Sisera, kiu loĝis en Ĥaroŝet-Goim. Kaj la Izraelidoj ekkriis al la Eternulo; ĉar tiu havis naŭcent ferajn ĉarojn, kaj li forte premis la Izraelidojn dum dudek jaroj. Debora, profetino, edzino de Lapidot, estis en tiu tempo juĝistino de la Izraelidoj; ŝi sidadis sub la palmo de Debora, inter Rama kaj Bet-El, sur la monto de Efraim; kaj la Izraelidoj venadis al ŝi por juĝo. Kaj ŝi sendis kaj alvokigis Barakon, filon de Abinoam, el Kedeŝ-Naftali, kaj diris al li: La Eternulo, Dio de Izrael, ordonis: Iru, konduku la militistaron sur la monton Tabor, kaj prenu kun vi dek mil virojn el la Naftaliidoj kaj el la Zebulunidoj; kaj al la torento Kiŝon Mi alkondukos al vi Siseran, la militistestron de Jabin, kaj liajn ĉarojn kaj lian amasegon; kaj Mi transdonos lin en viajn manojn. Tiam diris al ŝi Barak: Se vi iros kun mi, mi iros; sed se vi ne iros kun mi, mi ne iros. Kaj ŝi respondis: Bone, mi iros kun vi; sed vi ne havos gloron sur la vojo, kiun vi iros; ĉar en la manojn de virino la Eternulo transdonos Siseran. Kaj Debora leviĝis, kaj iris kun Barak al Kedeŝ.

Psalmo: 34, 1-15

Serĉu pacon kaj ĉasu ĝin

Mi gloros la Eternulon en ĉiu tempo;
Ĉiam laŭdo por Li estos en mia buŝo.

popolo, kiu iĝis lia aparta propraĵo.

Sekve ni estas komisiitaj anonci la grandajn agojn de Dio por kiuj li estis gvidintaj nin de mallumo en sian lumon. Per la evangelio laŭ Mateo ni eltrovas pluran flankon: Ni estas komunumo de sanktuloj, kaj nia unueco transiras la limojn de familio, parenceco kaj klaso. Nin unuigas la preĝado je unueco kaj la strebado fari la volon de Dio.

Demandoj por la persona pripensado

Kion signifas "komunumo de sanktuloj" por vi, en la tradicio de via Eklezio?

Kiamaniere nia vokiĝo al "sankta popolo" estas impulso por transiri la limojn de nia loka komunumo?

Preĝo

Kompatema Dio, kune kun ĉiuj, kiuj vokas la nomon de l' Sinjoro, ni aŭdas kiel rompigitaj homoj vian alvokon, esti sanktuloj. Vi faris nin al elektita familio, al reĝa pastreco, al sankta popolo.

Per la forto de la Sankta Spirito kunvenigu nin en la komunumo de la sanktuloj. Plifortigu nin, ke ni faru vian volon, kaj ke ni anoncu la grandajn agojn de Jesuo Kristo, nia Sinjoro. Amen

LA DUA TAGO:

Kune... ni danku pro la graco de Dio en ĉiu el ni

Legajtoj

Unua legaĵo: Rea 26, 1-11

La Eternulo elkondukis nin el Egiptujo

Kaj kiam vi venos en la landon, kiun la Eternulo, via Dio, donas al vi kiel posedaĵon, kaj vi ekposedos ĝin kaj enloĝiĝos en ĝi: tiam prenu el la unuaj el ĉiuj fruktoj de la tero, kiujn vi ricevos de via tero, kiun la Eternulo, via Dio, donas al vi, kaj metu en korbon, kaj iru al la loko, kiun la Eternulo, via Dio, elektos, por loĝigi tie Sian nomon; kaj venu al la pastro, kiu estos en tiu tempo, kaj diru al li: Mi sciigas hodiaŭ antaŭ la Eternulo, via Dio, ke mi eniris en la landon, pri kiu la Eternulo ĵuris al niaj patroj, ke Li donos ĝin al ni. Kaj la pastro prenos la korbon el via mano, kaj metos ĝin antaŭ la altaron de la Eternulo, via Dio.

Kaj vi ekparolos, kaj diros antaŭ la Eternulo, via Dio: Vaganta Siriano estis mia patro, kaj li foriris en Egiptujon kaj enloĝiĝis tie fremdule kun malmulte da homoj, kaj fariĝis tie popolo granda, forta, kaj multenombra; kaj la Egiptoj agis malbone kontraŭ ni kaj premis nin kaj metis sur nin malfacilan laboron; kaj ni ekkriis al la Eternulo, la Dio de niaj patroj, kaj la Eternulo aŭskultis nian voĉon kaj vidis nian mizeron kaj nian laboradon kaj nian prematecon; kaj la Eternulo elkondukis nin el Egiptujo per mano forta kaj per brako etendita kaj per granda teruro kaj per signoj kaj mirakloj; kaj Li venigis nin al ĉi tiu loko kaj donis al ni ĉi tiun landon, landon, en kiu fluas lakto kaj mielo; kaj nun jen mi alportis la unuajn fruktojn de la tero, kiun Vi donis al mi, ho Eternulo. Kaj vi metos tion antaŭ la Eternulon, vian Dion, kaj vi adorkliniĝos antaŭ la Eternulo, via Dio. Kaj vi estos gaja pro la tuta bono, kiun donis la Eternulo, via Dio, al vi kaj al via domo, vi, kaj la Levido, kaj la fremdulo, kiu loĝas inter vi.

Sekvante la alvokadon de Jesuo, ni evangelizas pro tiuj, kiuj ankoraŭ ne aŭdis la evangelion, kaj ankaŭ pro tiuj, kiuj jam konas ĝin. Tiu predikado entenas la vokon al la komuneco kun Dio kaj kreas komunumon inter ĉiuj kiuj respondas tiun vokon.

Demandoj por la persona pripenso

Kie vi spertas la vokon al la komuneco kun Dio?

Kiel Dio vokas vin al la komuneco kun aliaj, interne kaj ekstere de via Eklezio?

Preĝo

Amanta Patro, vi vokis nin al la komuneco kun via Filo, kaj vi volis, ke nia evangelizado estu fruktodona. Kapabligu nin, per la graco de via Spirito, ke ni amu nin unu la alian kaj ke ni vivu kune en harmonio, por ke nia ĝojo estu plena. Amen.

Dua legaĵo: 1 Joh 1, 3-7

Ni havas kunulecon unu kun la alia

Kion ni vidis kaj aŭdis, tion ni anoncas al vi, por ke vi ankaŭ havu kunulecon kun ni; kaj nia kunuleco estas kun la Patro kaj kun Lia Filo Jesuo Kristo; kaj ĉi tion ni skribas, por ke nia ĝojo kompletigu. Kaj jen estas la anonco, kiun ni aŭdis de Li kaj anoncas al vi, ke Dio estas lumo, kaj da mallumo estas en Li neniom. Se ni diras, ke ni havas kunulecon kun Li, kaj iradas en la mallumo, ni mensogas, kaj ne faras la veron; sed se ni iradas en la lumo, kiel Li estas en la lumo, ni havas kunulecon unu kun la alia, kaj la sango de Jesuo, Lia Filo, nin purigas de ĉia peko.

Evangelio: Joh 15, 12-17

Mi nomis vin amikoj

Jen estas mia ordono: ke vi amu unu alian tiel same, kiel mi vin amis. Neniu havas amon pli grandan ol tio, ke iu demetus sian vivon por siaj amikoj. Vi estas miaj amikoj, se vi faras tion, kion mi al vi ordonas. Mi jam ne nomas vin sklavoj, ĉar la sklavo ne scias, kion lia sinjoro faras; sed mi nomis vin amikoj, ĉar ĉion, kion mi aŭdis de mia Patro, mi sciigis al vi. Vi ne elektis min, sed mi elektis vin, kaj starigis vin, por ke vi iru kaj donu frukton, kaj ke via frukto daŭru; por ke la Patro donu al vi ĉion ajn, kion vi petos de Li en mia nomo. Tion mi ordonas al vi, por ke vi amu unu la alian.

Tri sugestoj por pripenso

Ni estas vokataj al la komuneco kun Dio la Patro kaj lia Filo Jesuo Kristo kaj la Sankta Spirito. Ju pli ni alproksimiĝas al la Triunua Dio, des pli ni alproksimiĝas unu al la alia en kristana unueco.

Kristo instigis ŝanĝon de nia interrilato, li nomas nin amikoj, ne plu sklavoj. La amo de Kristo kapabligas nin por amikeco kaj reciproka amo, kaj helpas nin superi rilatojn, kiuj estas karakterizataj de strebado je potenco.

Psalmo 100, 1-5

Gloru kaj altigu la Sinjoron

Ĝoje krii al la Eternulo la tuta tero!
Servu al la Eternulo kun ĝojo,
Venu antaŭ Lian vizaĝon kun kanto.
Sciu, ke la Eternulo estas Dio;
Li nin kreis, kaj al Li ni apartenas,
Lia popolo kaj ŝafoj de Lia paŝtejo.

Eniru en Liajn pordegojn kun dankado,
En Liajn kortojn kun laŭdado.
Gloru Lin, benu Lian nomon;
Ĉar la Eternulo estas bona;
Lia favorkoreco estas eterna,
Kaj de generacio al generacio daŭras Lia fideleco.

Dua legaĵo: Fil 1, 3-11

Mi dankas mian Dion ĉe ĉiu rememoro pri vi

Mi dankas mian Dion ĉe ĉiu rememoro pri vi, ĉiam en ĉiu mia preĝo por vi ĉiuj farante la peton kun ĝojo, pro via partopreno en la evangelio de post la unua tago ĝis nun; pri tio mem fidante, ke Tiu, kiu komencis bonan faron ĉe vi, ĝin perfektigados ĝis la tago de Jesuo Kristo; kaj ja decas, ke mi tion sentu pri vi ĉiuj, ĉar vi havas min en via koro, kaj vi ĉiuj estas kun mi partoprenantoj en la graco, kiel en miaj katenoj, tiel ankaŭ en la defendo kaj fortigado de la evangelio.

Ĉar Dio estas mia atestanto, kiel fervore mi sopiras al vi ĉiuj laŭ la koramo de Kristo Jesuo.

Evangelio: Joh 1, 1-18

La graco kaj la vero estiĝis per Jesuo Kristo

En la komenco estis la Vorto, kaj la Vorto estis kun Dio, kaj la Vorto estis Dio. Tiu estis en la komenco kun Dio. Ĉio estiĝis per li; kaj aparte de li estiĝis nenio, kio estiĝis. En li estis la vivo, kaj la vivo estis la lumo de la homoj. Kaj la lumo brilas en la mallumo, kaj la mallumo ĝin ne venkis. De Dio estis sendita viro, kies nomo estis Johano. Tiu venis kiel atestanto, por atesti pri la lumo, por ke ĉiuj per li kredu. Li ne estis la lumo, sed li venis, por atesti pri la lumo. Tio estis la vera lumo, kiu lumas al ĉiu homo, venanta en la mondon. Tiu estis en la mondo, kaj la mondo per li estiĝis, kaj la mondo lin ne konis. Li venis al siaj proprajoj, kaj liaj propruloj lin ne akceptis. Sed al ĉiuj, kiuj lin akceptis, li donis la rajton fariĝi filoj de Dio, al la kredantoj al lia nomo, kiuj naskiĝis nek el sango, nek el volo de karno, nek el volo de homo, sed el Dio. Kaj la Vorto fariĝis karno kaj loĝis inter ni, kaj ni vidis lian gloron, gloron kvazaŭ de la solenaskita de la Patro, plena de graco kaj vero. Johano atestis pri li, kaj kriis, dirante: Ĉi tiu estas li, pri kiu mi diris: Kiu venas post mi, tiu estas metita super mi, ĉar li ekzistis pli frue ol mi. Ĉar el lia pleneo ni ĉiuj ricevis, kaj gracon post graco. Ĉar la leĝo estis donita per Moseo; la graco kaj la vero estiĝis per Jesuo Kristo. Neniu iam vidis Dion; la solenaskita Filo, kiu estas en la sino de la Patro, Lin deklaris.

Tri sugestoj por pripensoj

En Readmono, dankemo estas vivmaniero signita per tio, ke oni akre konscias en si kaj ĉirkaŭ si la ĉeeston de Dio. Ĝi estas la kapablo ekkoni, ke la graco de Dio estas laboranta kaj vivanta en ĉiu el ni kaj en ĉiuj popoloj ĉiuloke, kaj danki al Dio. La ĝojo, kiu rezultas de tiu graco, estas tiel profunda, ke ĝi etendiĝas eĉ al la "elmigrantoj, kiuj estas meze de vi".

LA KVINA TAGO: Kune... ni estas vokataj al komuneco

Legajoj

Unua legaĵo: Jes 43, 1-7

Mi estos kun vi

Sed nun tiele diras la Eternulo, kiu vin kreis, ho Jakob, kaj kiu vin estigis, ho Izrael: Ne timu, ĉar Mi vin savos; Mi vokos vin laŭ via nomo, vi estas Mia. Kiam vi transiros akvon, Mi estos kun vi, kaj trans riverojn, ili vin ne dronigos; kiam vi iros en fajron, vi ne brulvundiĝos, kaj flamo vin ne bruligos. Ĉar Mi estas la Eternulo, via Dio, la Sanktulo de Izrael, via Savanto; Egiptujon Mi donos kiel vian elaĉeton, Etiopujon kaj Seban anstataŭ vi. Ĉar vi estas kara en Miaj okuloj, vi estis honorita kaj Mi vin amas; tial Mi fordonos aliajn homojn anstataŭ vi kaj gentojn anstataŭ via animo. Ne timu, ĉar Mi estas kun vi; de la oriento Mi venigos vian idaron, kaj de la okcidento Mi vin kolektos. Mi diros al la nordo: Redonu! kaj al la sudo: Ne retenu! venigu Miajn filojn de malproksime kaj Miajn filinojn de la randoj de la tero, ĉiun, kiu estas nomata per Mia nomo kaj kiun Mi kreis por Mia gloro, faris, kaj estigis.

Psalmoj: 133, 1-4

Jen, kiel bone kaj ĉarme estas, se fratoj vivas kune!

Jen, kiel bone kaj ĉarme estas,
Se fratoj vivas kune!
Kiel la bona oleo,
Kiu de la kapo defluas sur la barbon, la barbon de Aaron,
Kaj defluas sur la randon de lia vesto;
Kiel la roso, Kiu de Ĥermon malleviĝas sur la montojn de Cion;
Ĉar tie la Eternulo donas la benon, Vivon por eterne.

Tri sugestoj por pripenso

La eterna Unueco inter Patro, Filo kaj Sankta Spirito alproksimigas nin al la amo de Dio, kaj vokas nin partoprenigi en la agado de Dio en la mondo, kio estas amo, mizerikordo kaj justeco. Mizerikordo kaj justeco ne estas dividitaj en Dio, sed kunigitaj per senfina amo, realiĝanta en la Interligo de Dio kun ni kaj kun la tuta kreado.

Zeharja, ĵus patrigita, atestas la manifestadon de la Dia mizerikordo, kiu plenumas sian promeson al Abrahamo kaj al liaj posteuloj. Dio estas fidela al sia Sankta Interligo.

Dum ni preĝadas por la unuigo de la kristanoj, ni ne devas flanke lasi renkontiĝi kaj kuraĝigi nin reciproke, sproni nin unu la alian per la amo kaj bonaj agadoj, dirante „Dio plenumas siajn promesojn“.

Demandoj por la persona pripenso

Kiamaniere vi sukcesis ekrimarki la fidelecon de Dio en via vivo kaj en la vivo de via komunumo pasintjare?

Kiamaniere la fideleco de Dio inspiras nin atingi la celon de la unuigo inter la kristanoj?

Preĝo

Ho fidela Dio, ni dankas vin pro via senĉesa amo kaj pro via vero disvastiĝanta trans la nuboj. Dum ni atendas la plenan kaj videblan unuigon de via Eklezio, en ĝoja espero, laborante kaj preĝante kune, plenigu nin per la konfido de via promeso. Ni petas ĝin de Vi per Jesuo Kristo, nia Sinjoro, per la povo de la Sankta Spirito, ununura Dio nun kaj ĉiam. Amen.

En ekumena kunteksto, dankemo estas ĝojemo pri la donoj de la gracoj de Dio ĉeestantaj en aliaj kristanaj komunumoj, inklino, kiu ebligas ekumanan interŝanĝon de donacoj kaj helpas, ke oni lernu unu de la aliaj.

La tuta vivo estas donaco de Dio: de la kreado ĝis la tempo, kiam Dio enkarniĝis en la vivo kaj ago de Jesuo Kristo, kaj plue ĝis hodiaŭ. Ni danku Dion por la donacoj de graco kaj vero, kiuj estis atribuitaj al ni en Jesuo Kristo, kaj kiuj manifestiĝas en ĉiu el ni kaj en niaj Eklezioj.

Demandoj por la persona pripenso

Kiuj donacoj de la graco de Dio, devenantaj de aliaj ekleziaj tradicioj, ni jam spertas en niaj propraj komunumoj?

Kiamaniere la diverstradiciaj kristanoj povus pli bone akcepti kaj dividi inter si la diversecon de la diaj donacoj atribuitaj al ĉiu el ni?

Preĝo

Dio tre amanta kaj plena je boneco, ni dankas al Vi por la bonfaroj de via graco, kiujn ni malkovras en nia propra tradicio kaj en la tradicioj de la aliaj eklezioj. Per la graco de via Sankta Spirito, faru, ke nia dankemo daŭre kresku pere de niaj renkontoj kaj de la sperto senĉese renovigita de via donaco de unueco. Pri tio, ni petas Vin per Jesuo Kristo, nia Sinjoro. Amen.

LA TRIA TAGO:

Kune... al ni mankas neniu el la spiritaĵoj

Legajoj

Unua legaĵo: Ijo 28, 20-28

Timo antaŭ Dio estas saĝo

De kie venas la saĝo?

Kaj kie estas la loko de prudento?

Kaŝita ĝi estas antaŭ la okuloj de ĉio vivanta,

Nevidebla por la birdoj de la ĉielo.

La abismo kaj la morto diras:

Per niaj oreloj ni aŭdis nur famon pri ĝi.

Dio komprenas ĝian vojon,

Kaj Li scias ĝian lokon;

Ĉar Li rigardas ĝis la fino de la tero,

Li vidas sub la tuta ĉielo.

Kiam Li donis pezon al la vento

Kaj aranĝis la akvon laŭmezure,

Kiam Li starigis leĝon por la pluvo

Kaj vojon por la fulmo kaj tondro:

Tiam Li vidis ĝin kaj anoncis ĝin,

Pretigis ĝin kaj esploris ĝin;

Kaj Li diris al la homoj:

Vidu, timo antaŭ Dio estas saĝo,

Kaj evitado de malbono estas prudento.

Psalmo: 145,10-21

Vi malfermas Vian manon kaj satigas favore ĉion vivantan

Gloros Vin, ho Eternulo, ĉiuj Viaj kreitaĵoj,

Kaj Viaj fideluloj Vin benos.

Dua legaĵo: Heb 10, 19-25

Dio plenumas siajn promesojn

Havante do, fratoj, kuraĝon eniri en la plejsanktejon per la sango de Jesuo, per la vojo nova kaj vivanta, kiun li dediĉis por ni, tra la kurteno, tio estas, lia karno, kaj havante grandan pastron super la domo de Dio, ni alproksimiĝu kun sincera koro, en pleneco de fido, kun niaj koroj aspergitaj for de malbona konscienco, kaj kun la korpoj lavitaj per akvo pura; ni tenu firme la konfeson de nia espero sendekliniĝe; ĉar la promesinto estas fidela; kaj ni pripensu unu la alian, por instigi al amo kaj bonaj faroj; ne forlasante nian kunvenadon, kiel estas la kutimo de iuj; sed konsilante unu la alian, kaj des pli forte, ju pli vi vidas la tagon alproksimiĝanta.

Evangelio: Luk 1, 67-75

Li faris elaĉeton por sia popolo

Kaj lia patro Zeĥarja pleniĝis de la Sankta Spirito, kaj profetis, dirante:

Benata estu la Eternulo, la Dio de Izrael,

Ĉar Li vizitis Sian popolon kaj faris por ili elaĉeton,

Kaj levis kornon de savo por ni

En la domo de Sia servanto David,

Kiel Li parolis per la buŝo de Sijaj sanktaj profetoj,

De post la komenco de la mondo,

Savadon el niaj malamikoj

Kaj el la mano de ĉiuj niaj malamantoj;

Por montri Sian bonecon ĉe niaj patroj,

Kaj por memori Sian sanktan interligon;

La ĵuron, kiun Li ĵuris al nia patro Abraham;

Ke Li donos al ni, ke, liberigite el la mano de niaj malamikoj,

Ni servu Lin sentime,

En sankteco kaj justeco antaŭ Li

Ĉiujn niajn tagojn.

LA KVARA TAGO:

Kune... ni proklamu, ke Dio plenumas siajn promesojn

Legaĵoj

Unua legaĵo: Lam 3, 19-26

La kompatemeco de la Sinjoro ne finiĝis

La memoro pri mia mizero kaj miaj suferoj estas vermuto kaj galo.
Konstante rememorante tion, senfortiĝas en mi mia animo.
Sed tion mi respondas al mia koro, kaj tial mi esperas:

Ĝi estas favorkoreco de la Eternulo, ke ni ne tute pereis; ĉar Lia
kompatemeco ne finiĝis,
Sed ĉiumatene ĝi renoviĝas; granda estas Via fideleco.
Mia parto estas la Eternulo, diras mia animo; tial mi esperas al Li.

La Eternulo estas bona por tiuj, kiuj esperas al Li, por la animo, kiu
serĉas Lin.
Bone estas esperi pacience helpon de la Eternulo.

Psalmo: 57, 8-12

Ĝis la nuboj estas Via vero

Fortika estas mia koro, ho Dio, fortika estas mia koro;
Mi kantos kaj gloros.
Vekiĝu, mia honoro, vekigu, psaltero kaj harpo;
Mi vekos la matenan ĉielruĝon.
Mi gloros Vin, ho mia Sinjoro, inter la popoloj;
Mi prikantos Vin inter la gentoj.
Ĉar granda ĝis la ĉielo estas Via boneco,
Kaj ĝis la nuboj estas Via vero.
Altiĝu super la ĉielo, ho Dio;
Via gloro estu super la tuta tero.

Ili raportos pri la gloro de Via regno
Kaj parolos pri Via potenco,
Por sciigi al la homidoj Lian potencon
Kaj la majestatan gloron de Lia regno.
Via reĝeco estas reĝeco eterna,
Kaj Via regado estas por ĉiuj generacioj.
La Eternulo subtenas ĉiujn falantojn
Kaj restarigas ĉiujn kurbigitojn.
Ĉies okuloj estas turnitaj al Vi,
Kaj Vi donas al ili ilian manĝon en ĝia tempo.
Vi malfermas Vian manon
Kaj satigas favore ĉion vivantan.
Justa estas la Eternulo en ĉiuj Siaj vojoj
Kaj bona en ĉiuj Siaj faroj.
Proksima estas la Eternulo por ĉiuj, kiuj Lin vokas,
Por ĉiuj, kiuj vokas Lin sincere.
La deziron de Siaj respektantoj Li plenumas,
Kaj ilian krion Li aŭdas kaj helpas ilin.
La Eternulo gardas ĉiujn Siajn amantojn,
Kaj ĉiujn malvirtulojn Li ekstermas.
La gloron de la Eternulo eldiros mia buŝo,
Kaj ĉiu karno benu Lian sanktan nomon ĉiam kaj eterne.

Dua legaĵo: Efesanoj 4, 7-13

*[...] al ĉiu el ni la graco estas donita, laŭ la mezuro de la
dono de Kristo.*

Sed al ĉiu el ni la graco estas donita, laŭ la mezuro de la dono de
Kristo. Tial li diras: Kiam li supreniris alten, li alkondukis kaptitojn,
Kaj donis donacojn al homoj. Ĉi tio do: Li supreniris – kio ĝi estas
krom tio, ke li ankaŭ antaŭe malsupreniris ĝis la profundaĵoj de la
tero? La malsuprenirinto – tiu sama estis la suprenirinto alte super
ĉiuj ĉielo, por plenigi ĉion. Kaj unujn li donis por esti apostoloj;
aliajn, profetoj; aliajn, evangeliistoj; kaj aliajn, paŝtistoj kaj instruistoj.

toj; por perfektigo de la sanktuloj, por la laboro de pastrado, por la konstruo de la korpo de Kristo, ĝis ni ĉiuj atingos la unuecon de la fido kaj de la scio de la Filo de Dio, ĝis la homo perfekta, ĝis la mezuro de la matureco de la pleneco de Kristo.

Evangelio: Mar 8, 14-21

Kial vi diskutas pro tio, ke vi ne havas panon?

Kaj ili forgesis preni panojn; kaj nur unu panon ili havis kun si en la ŝipeto. Kaj li admonis ilin, dirante: Zorgu, gardu vin kontraŭ la fermentaĵo de la Fariseoj kaj la fermentaĵo de Herodo. Kaj ili diskutis unu kun la alia, dirante: Ĉar ni ne havas panojn. Kaj Jesuo, eks-ciante tion, diris al ili: Kial vi diskutas pro tio, ke vi ne havas panon? ĉu vi ankoraŭ ne konscias nek komprenas? ĉu via koro estas obstinigita? Okulojn havante, ĉu vi ne vidas? kaj orelojn havante, ĉu vi ne aŭdas? kaj ĉu vi ne memoras? Kiam mi dispecigis la kvin panojn por la kvin mil, kiom da korboj da fragmentoj vi kolektis? Ili respondis al li: Dek du. Kaj kiam la sep por la kvar mil, kiom da korbegoj da fragmentoj vi kolektis? Kaj ili respondis al li: Sep. Kaj li diris al ili: Ĉu vi ankoraŭ ne komprenas?

Tri sugestoj por pripenso

Ijob komprenas ke, ankaŭ se oni forportis de li ĉion, kion li posedis, la timo de la Sinjoro, origino de la saĝo, restas. Kiel gefratoj en Kristo, eĉ se malriĉigitaj pro la dividoj inter ni, ni ĉiuj estas riĉigitaj per la difavoro de pluraj donacoj, spiritaj kaj materiaj por starigi la korpon de Kristo.

Tamen, malgraŭ la promesoj de Dio, la malavaraj vivo kaj amo de Jesuo, kelkfoje, kiel la disĉiploj de tiu peceto laŭ Marko, ni forgesas nian veran riĉecon: ni disigas, amasigas, paroladas kaj agadas kvazaŭ ni ne havus panon.

Kristo ne estas dividita: kune ni havas sufiĉe da donacojn por kundi-
dividi ilin reciproke inter ni kaj kun ĉiu vivanta estaĵo.

Demandoj por la persona pripenso

Kiam kaj kiel ni forgesis la abundon de Diaj donacoj, male asertante ne havi plu panon?

Kiamaniere ni povas pli bone kundi-
dividi la spiritajn kaj materiajn donacojn konfidatajn al ni, por meti ilin en komunecon kun la aliuloj?

Preĝo

Ho Dio fidela kaj malavara, ni benas Vin, ĉar Vi donis al ni ĉiujn spiritajn donacojn necesajn por atingi la senfinan grandecon de Kristo: per la saĝeco, per la serva spirito kaj per la pano. Helpu nin esti signo de via abundo, kolektiĝintaj en unueco por porti la donacojn de Via eterna Regno ĉien ajn, kie estas sufero kaj mizero. Plenplenaj je Via Spirito, ni preĝu en la nomo de la Ununura, kies donaco estis la pano de sia vivo dispecigata por ni, nun kaj ĉiam. Amen.